


Revuo
ESPERANTO
Internacia

N-ro 578 (1) JANUARO 1954



Haarlem : Gravenstenenbrug.

Mezepokaj fasadoj

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio

Fondinto : H. HÖDLER

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represajon al nia redakcio.

Redaktoro : HANS JAKOB

Jara abono (1954) : 15 ŝil. anglaj (kun membreco kaj jarlibro 20 ŝil.)

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj

Ĉion por la redakcio sendu al
ESPERANTO

Palais Wilson, Genève, Svis.

Urgajn informojn sendu rekte
al Rickmansworth

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo £6 ½ paĝo £3
¼ paĝo 30 ŝil. ⅓ paĝo 15 ŝil.

Anoncetoj pri korespondado :

2 pencoj por unu vorto aŭ 1 int. respond-
kupono por ĉiu duo da vortoj

Legantoj en 80 landoj

Eldonnumero 6000

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la
revuo ESPERANTO, abonado, reklamoj,
anoncetoj sendu al
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo



Enhavo

Specialaj Artikoloj :

Alvoko je la nova jaro : <i>La Prezidanto</i>	paĝo 1
Esperantismaj Problemoj—La Financado : <i>Hans Jakob</i> ..	3
La Plua Disvastigo de la Internacia Lingvo : <i>E. D. Durrant</i>	21
Vagado kaj Varbado : <i>C. C. Goldsmith</i>	9

Oro en Klorofilo : <i>W. A. Gething</i> . . .	28
---	----

39a Universala Kongreso :

Oficiala Komunikado n-ro 3	16
Nederlando, Kongreslando 1954 : <i>H. Bakker</i> ..	17

Belarta Konkurso 1953 :

Raporto pri la poeziaj branĉoj	14
--	----

Poezio :

La Najtingalo : <i>G. Faure (L. Thévenin)</i>	2
---	---

Konstantaj Rubrikoj :

Centro de Esploro kaj Dokumentado	7
Enigma Konkurso	30
Esperantista Vivo	27
Internacia Konkurso 1953	10
Nia Forumo	20
Oficiala Informilo	31
Radio kaj Esperanto	19
Tra la Libraro	11
Vivo Virina	6

Revuo

ESPERANTO

Internacia

N-ro 578

Januaro 1954



Alvoko je la nova jaro de la Prezidanto de U.E.A.

ANTAŭ unu jaro mi proponis al la esperantistoj, ke nia devizo por 1953 estu: “Disvastigi, plibonigi kaj firmigi la kontakton kun oficialaj rondoj kaj samtempe grandskale daŭre informi la ĝeneralan publikon pri la genia solvo de la kia estas Esperanto”.

Je la sojlo al la ĝojo—gratulante mia espero plenumiĝis.

Kaŭze de la Konferenco de Unesko proponis al la landaj unuopaj esperantistoj prezenti al la oficialaj necesajn faktojn pri nia admono kaŭzis laboro kaj eĉ grandajn plendis, sed ĉiu kun devon. U.E.A. kiel ŝparis siajn fortojn kaj pere de sia oficejo Unesko zorge kompilitan faktaron Esperanto-movado.

La jaro 1953 do kiu bone ekipis nin per fortaj argumentoj por nia lingvo. De la jaro 1954 ni atendas, ke tiuj argumentoj estos lerte kaj kompetente eluzitaj, por ke la Ĝenerala Konferenco de Unesko en Montevideo faru decidon, kiu korespondas al la graveco de nia lingvo. Ŝajnas al mi, ke unu el la ĉefaj taskoj—almenaŭ la plej urĝa—estas kolekti sufiĉe da mono por ke ni povu sendi al la Unesko-konferenco taŭgan reprezentanton, kiu scios pledi por nia afero. Unu landa asocio jam organizis tutlandan kampanjon por kolekti monon por la *Fondaĵo Montevideo* kun bonega rezulto (=pli ol £200). Kaj en Aŭstrujo eĉ la ministro de edukado persone donacis £5. Gratulon!



E. Malmgren
Prezidanto de U.E.A.

nova jaro 1954 mi kun vin—konstatas, ke

decido de la Ĝenerala en Parizo U.E.A. asocioj kaj al multaj diversajn laborojn por instancoj ĉiujn nia lingvo. Kvankam oferon de tempo kaj monelspezojn, neniu fervoro faris sian organizaĵo mem ne en la lastaj monatoj CED transdonis al kolektitan kaj bone pri la tutmonda

estis prepara periodo,

Mi do nun alvokas ĉiujn esperantistojn kontribui al la *Fondaĵo Montevideo* por certigi, ke en tiu historia momento, kiam Unesko en Montevideo faros decidon pri Esperanto, nia reprezentanto povu ĉeesti por persone prezenti kaj defendi la vidpunktojn de la esperantistoj.

Jen mia novjara alvoko, kaj al tio mi aldonas mian admonon : Daŭrigu ĉiu esperantisto en sia loko energian agadon por krei ankoraŭ pli fortan movadon, pli grandan anaron kaj pli lertajn adeptojn de la internacia lingvo !

E. Malmgren.

Imitinda Ekzemplo

Laŭ informo, la Torina Grupo en Italujo organizas specialan studrondon, kies celo estas la studado de la Esperanta literaturo. La grupo pristudas precipe originalajn verkojn kaj tradukojn de Zamenhof. Post legado kaj komentado de kelkaj fabeloj de Andersen, en la Zamenhofa traduko, la studrondo pristudis *Ifigenio en Taŭrido* de Goethe, ankaŭ en Zamenhofa traduko, trafoliumante samtempe *Faŭsto* de Goethe, tradukitan de la germano Bartelmes. Poste la rondo faris interesan komparon inter la du tradukaj stiloj.

Jen utila laboro por membroj de niaj grupoj, kio helpos ne nur la propran grupon, sed ankaŭ la disvastigon de niaj literaturaj trezoroj. Se grupoj havas informon interesan kaj instigan por aliaj grupoj, bonvolu sendi ĝin al la Estrarano respondeca por grupaferoj, nome : D. Kennedy, 21 Westfield Road, Bishop Auckland, County Durham, Anglujo.

La Najtingalo

En arboj revivintaj juna suko fluas.
Vesper' aprila ridas al migdala floro ;
kamparo estas muta, kaj noktiĝa horo
per fingroj mortigantaj, lumon
findetruas.

Jen, najtingalo, via kanto—
supreniro—
velura kanto, kiu ĵetas sen reteno
al la senviglaĵoj de
printemp-ĝardeno
la perlojn de la rev' kaj trilojn de
l' deziro.

Alterne, kiel faras rido aŭ singulto,
ĝi flagras tra la sopiranta nokto-ĉarmo,
kristale klara, freŝagrabla kiel ŝalmo,

Kaj hom', en kies koro regas aminklino,
meditas halucinacie pro aŭskulto
de tia am', tremanta en birdeta sino.

Georges Faure

(el la franca tradukis Lucien Thévenin)

LA JUNAJ DETEKTIVOJ de J. H. Sullivan

kun ilustraĵoj de Brenda Goodwin

Interesa rakonto por la junularo pri kontrabandistoj

Prezo 2 ŝilingoj, aŭfranko 2p. (aŭ 6 rpk.)

Eldonita de The Esperanto Publishing Co. Ltd.

Mendu ĉe enlanda libroservo aŭ ĉe U.E.A.

Esperantismaj Problemoj

LA FINANCADO

NEINFORMITAJ personoj opinias ke ni, t.e. la Esperanto-Movado, disponas pri gigantaj rimedoj financaj kaj okaze de kompetenta informado ĉiuj miras, ke estis eble starigi movadon tiom ampleksan preskaŭ *nur* el kotizoj kaj maloftaj donacoj de mecenoj. Ja eĉ inter la Esperantistoj mem, regas malklareco kaj nescio pri tiu-ĉi tiom grava demando: Kiel financi ĉion? Estas taŭga momento prilumi ankaŭ tiun-ĉi eron de nia penado, la malpli interesan sed plej pezan por regi: La financoj.

Unua rimarko: La movado estiĝis el la oferemo de anoj de meza kaj laborista klasoj (tiom kiom oni hodiaŭ povas fari distingon inter ĉi tiuj du tavoloj de la homa socio). Dua rimarko: La Esperanto-Movado estas plejparte eŭropa; laŭ la nombro de anoj, la ceteraj kontinentoj formas nur kvinonon de la tuto. Triarimarko: La komenco de *organizita* movado estas la jaroj inter 1905 ĝis 1908, la lasta jaro estas tiu de la fondo de UEA (28an de aprilo 1908).

1. Enkonduko

La unua Centro Esperantista estis la Centra Oficejo Esperantista en Parizo, starigita de meceno de nia movado, Generalo Sébert, distinga figuro multrilate. Bazita je koncepto registara, la ECO kunordigis la ĉefajn elementojn de la tiama internacia organizo (lingvaj aŭtoritatoj, kongresoj) kaj eldonis valorajn dokumentojn pri ties laboroj. Dependa grandparte de la malavareco de ĝia fondinto, la ECO serĉis

sistemon de financa partopreno de la Esperantistaro. La solvo estis la kreo de "Rajtigita Delegitaro" (formo de Esperantista Parlamento). La kotizo estis minimuma — po dek centimoj por membro. Sur tiu ĉi bazo estis trovitaj en 1911 2600 frankoj (oraj) por 26000 pagintoj. La pago okazis kolektive pere de la tiamaĵ naciaj organizaĵoj. Ĝi ne estis *kotizo*, sed *imposto*. Evidentiĝis ke tio ne sufiĉas kaj ne estis eble trovi la necesajn rimedojn por financi la plej necesajn aferojn: dokumentaro, Jarlibro, oficiala organo, ekstera propagando, rilatoj kun registaroj, organizo de la kongresoj kaj aliaj necesaj klopodoj. Plie mankis instanco kiu jure povus paroli en la nomo de la (neŭtrala) Esperanto-Movado. La kosto de la ECO, gvidita de Gabriel Chavet, estis pagita de Sinjoro Sébert kaj de aliaj donacintoj.

En jaro 1908 fondiĝis UEA kun organiza principo tute kontraŭa al tiu de ECO. Ĝi estis *Asocio* de individuaj membroj, kun reprezentantoj lokaj kaj kun Komitato elektita internacie. La plenumanta instanco estis la Centra Oficejo de UEA en Genève, ĝia organo la revuo *Esperanto*. Malalta kotizo sed multaj membroj estis la origina gvidprincipo, videble prenita el la komerca percepto: grandkvante, sekve malkare. Ĝi montriĝis erara kaj la tranĉa reformo en 1912 kun deca kotizo kaj konforma kompenso al la paginta membro, sankciis financan konduton sur kiu praktike baziĝas ankoraŭ nun UEA. Interese estas scii, ke la tiama kotizo

de simpla membro kun Jarlibro estis 2.50 frankoj (oraj) kaj konsiderata kiel alta. La nuna sistemo de pluraj kategorioj evoluis iom post iom.

Tiom pri la frua tempo de nia organizita movado. Dezirante skribi pri financado en la nuna artikolo ni tuŝas la evoluon de la organizo mem. UEA konis rimarkindan sukceson dank' al la insistado je praktika apliko de la lingvo pere de la servoj. La iniciatoj de la animo de UEA, H. Hodler, por enŝovi la internacian lingvon estis rimarkindaj, ne nur pro la kuraĝo, sed pro la modesto de la rimedoj. Ni aldonu, ke la ĉefaj gvidantoj de UEA laboris honorofice. Nur dank' al tiu ĉi sindono de pluraj pioniroj la afero sukcesis. Ĉio evoluis kontentige kaj la jaro 1914 estis decida: la deka kongreso en Parizo devis sankcii novan formon de la internacia organizo esperantista. Ĉion tion haltigis la milito, kaj en 1918–19 oni devis rekomenci sub tute aliaj kondiĉoj.

Baldaŭ estos kvardek jaroj post la kulminacia jaro 1914. La konkludo pri la maniero de financado de nia movado, nacia kaj internacia, estas idealisma-filantropa, t.e. rezultiĝanta el la ofero de miloj kaj miloj da homoj. Mankas la ebleco “fari monon” el flankaj aferoj, servoj. Diversaj provoj estis faritaj sed ne kontentigis. Konstato plia estas, ke por la ordinaraj bezonoj (jarlibro, revuo, oficialaj dokumentoj kaj ankaŭ salajroj por la daŭre laborantaj oficistoj) la mono estas trovata, kvankam klopodige. Por la supera propagando, la rilatoj kun neregistaraj, internaciaj instancoj, instigoj grandstilaj, mankas la monrimedoj, same por decsalajrisuperajn homojn por difinitaj taskoj.

2. La financigo kaj la tekniko de la enkasigo

Kia bela tempo ĝis 1914, kiun ni ne plu vidos! Temas pri la facileco de interŝanĝoj internaciaj kaj interhomaj (ne komercaj). Je tiu ĉi tempo, se iu volis pagi malgrandan sumon de unu lando al alia, li plenigis poŝtmandaton internacian kaj por sumo pagota ĝis cent frankoj (oraj) la afranko estis (ni miru!) 50 centimoj! Al la tiama Centra Oficejo de UEA en Genève, la pagoj venis laŭ tiu ĉi maniero, senmalhelpe, senkomplikaĵo. Poŝtmandato-servo ekzistis ekzemple kun la vasta Ruslando (valoro de la rublo 2.50 frankoj!). De Vladivostok kiel de San Francisco, de Reykjavik kiel de Wellington en Novzelando, la montraŭfiko estis simpla, malmultekosta kaj—notu bone—sen limigoj.

Kiom tio signifas por la kontisto, ĉiu povas ja imagi al si. Interesas praktikulon scii, ke UEA bezonis nur tri kaskontojn: Kaso, Banko, Poŝtĉeko (post 1915). La kontado (librotenado) estis senkomplika, nur malofte necesis okupiĝi pri fremdaj valutoj, ĉio funkciis en *unu* mono.

Tio ŝanĝis ĝisfunde post la unua milito. La disfalo de la plimulto de valutoj (la ĉeso de la Latina Mon-unuiĝo en 1920) kaj la paglimigoj devigis krei elirvojn. La Centra Oficejo akceptis fremdajn monbiletojn (de multaj landoj oni povis sendi tiajn senmalhelpe ĝis 1931), plie necesis starigi poŝtĉekkontojn en deko da landoj. Tio rezultigis ŝveliĝon de administra-kontista laboro. La mono anstataŭ eniri rekte en *kason*, kolektiĝis ĉe ĉefdelegito aŭ peranto, kiu enpagis al enlanda poŝtĉeko de la Centra Oficejo. Tiu ĉi de tempo al tempo transigis la monon pere de banko aŭ alimaniere. Ĉiu, kiu iom komprenas kontadon (librotenadon)

konstatas kiom da flanka laboro necesigis tiu ĉi sistemo. Tamen ĝi funkciis bone. Post 1931 venis epoko por UEA kiu konsistis nur el sen-interrompa ĉeno de ĉikanoj kaj komplikaĵoj—por ricevi enkasigitan monon. Tio estis la ekkomenciĝo de la duflanka pagprocedo kaj la instaligo de la *Clearing*. Estas neimageble, la turniĝoj kiujn oni devis inventi por disponi pri propra mono.

Post la dua milito la senvaloriĝo de preskaŭ ĉiuj monunuoj rilate je la usona dolaro kaj la svisa franko fariĝis por UEA sufokiga. Per similaj kombinaĵoj, ekz. akiro de libroj vendotaj alilande, estis ebligata valorigi enspezitan monon alie blokitan por longa tempo kun la certa risko de kurzperdo. La transigo de mono al la Centra Oficejo en Rickmansworth fariĝis ia okulta scienco, aŭ sovaĝa arbaro de leĝoj, regularoj, limigoj kaj malpermesoj. Jen kiel aspektas la tekniko de la financado de nia Asocio. Estas klare, ke tiaj komplikaĵoj foruzas multan tempon kaj fariĝas plumba balasto.

El ĉio tio Estraro kaj stabo de la Centro lernis multon, resumeblan en kelkaj gvidlinioj :

1. La kotizoj sufiĉas ĝuste por financigi regulan administradon, administran stabon kaj la eldonaĵojn de la Asocio.

2. Ne estas eble por nedifinebla tempo salajri dece superan personon pri gvido de niaj aferoj. UEA devas kalkuli kun la libervola laboro metoda kaj sistema de aro da homoj, t.e. la Estraro kaj aliaj personoj ekster ĝi.

3. Ĉiu aparta klopodado devas esti financata per donacoj kaj kolektoj aŭ per donacego de mecenoj. Pri tia subteno de nia supera klopodado (ekzemple tiu ĉe UNESKO) la Estraro povas konsili eventualan mecenon

pretan por subteni tiun ĉi agadon pri maniero kaj procedo.

4. Grava estas la fakto ke la administra centro sidas en Britujo, lando kun bone organizita movado kaj oferemaj samideanoj. Tio certigas al UEA enspezon tute certan, kiu envenas sen notindaj klopodoj tempoperdigaj. Estis ĉiam la ideo de la verkinto, ke UEA devus trovi en propra lando kun konataj kondiĉoj, trionon de la bezonata mono. En komerco oni nomas tion “interna merkato”.

5. Kiel en ĉiu movado dependa de la kotizoj individuaj, ankaŭ en UEA la malcerteco pri la mon-eniro ludas rolon. Se UEA jam en januaro-februaro de la kuranta jaro disponus pri $\frac{3}{4}$ de la budĝetita enspezo, tiam granda zorgo estus for kaj oni povus labori pri aliaj aferoj. Sed ĝuste tie troviĝas ero da danĝero ripetiganta ĉiujare. Ĝenerale dum aŭgusto la kaso estas preskaŭ malplena kaj la ŝuldataj kotizoj eniras nur gutante. La ekzisto de la tielnomataj “gastomembroj” aliĝantaj por unu jaro aŭ du, formas elementon de ĉiama surprizo por la Centra Oficejo.

Ekzistas ankoraŭ aliaj faktoroj kiuj influas niajn financojn. Pri ili alian fojon. Konkludo tirebla el la antaŭaj linioj estas, ke ĉiu idealisma movado, sen flanka gajno el komercaj servoj, sen registara subteno, devas kalkuli kun la ofereco de la membroj. Tio ne estas speciala trajto de la Esperanto-Movado, ĝi karakterizas ĉiun penadon idealan. Komparante *nian* movadon kaj ĝiajn servojn, kun aliaj postulantaj kotizon pli altan ol ni kaj ricevantaj subtenojn atentindajn, ni rajtas ja fieri pri tio, kaj esti dankemaj al ĉiuj bonvoluloj kiuj komprenas, agas, kaj pagas.

Hans Jakob.



Vivo Virina

Gvidantino de ĉi tiu rubriko estas : S-ino E. Rapley, Esperanto House, Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo, al kiu oni adresu ĉiujn korespondaĵojn pri *Vivo Virina*.

Kiu volas respondon, nepre sendu rpk. (Britoj pm.) por afranko.


Sinjo kiel verkistino

Tre aktiva samideanino estas la nun 15-jara Sinjo Schmalzriedt, la filino de la UEA-delegito en Ravensburg/Sud-Germanujo. Jam antaŭ du-tri jaroj oni aŭdis multon pri ŝi okaze de ŝia vojaĝo al la nord-eŭropaj landoj kaj al Francujo, Britujo kaj Nederlando. La naciaj gazetoj tie raportis pri ŝi menciante la fakton, ke ŝi uzas nur Esperanton. Pli konata ŝi estis en Germanujo pro la diversaj dissendadoj de kelkaj radio-stacioj kaj pro la multaj artikoloj pri la "Eŭropo-Knabino" Sinjo. Intervjuoj kaj fotoj estis presitaj en la Eŭropa gazetaro kaj ĉiuj raportistoj substrekis la fakton utilon de Esperanto.

Kvankam Sinjo mem certe ne posedas ĉiujn eltranĉaĵojn, tamen ŝi povis kolekti ĝis nun 170 diversajn ĵurnalojn kaj gazetojn kun 95 bildoj pri ŝi, kaj raportojn kun ĉ. 12500 tekst-linioj en la lingvoj angla, dana, franca, germana, greka kaj itala.

Pri ŝiaj travivaĵoj Sinjo verkis manuskripton germanlingvan kaj la libro estas eldonita de germana novfondita eldonejo ne-esperantista sub la titolo: *Salto de Sinjo trans la limbarojn* (Sinjo's Sprung über die Grenzpfähle).

Laŭ konstato de bibliografia instituto nia juna fervora samideanino




Sinjo Schmalzriedt

fariĝis la plej juna verkistino en Germanujo, kiu fakto denove estis la kaŭzo, ke la gazetaro raportis amplekse pri ŝi kaj per tio samtempe varbis por la libro. Kiom da alskribaĵoj Sinjo jam estas ricevinta pro tio, mi ne scias ; sed preskaŭ ĉiuj leteroj montras intereson por nia lingvo.

Kompreneble la samideanaro aĉetos la "Sinjo-libron" kaj ni esperu, ke ili ne konservos ĝin en propra biblioteko, sed donacos al ne-esperantistoj !

M.B.



Centro de Esploro kaj Dokumentado
300, West End Lane, London, N.W.6, Anglujo

Raporto al Unesko

Antaŭ pluraj monatoj la Sekretariato de UNESKO turnis sin al CED kun la peto doni precizajn informojn pri kelkaj demandoj koncerne la originojn, la evoluon kaj la aktualan staton de la Internacia Lingvo Esperanto.

Utiligante la ampleksan materialon, kiu jam troviĝas en la arĥivo de CED kaj post specialaj esploroj pri kelkaj aspektoj, CED donis al la Sekretariato de UNESKO en Parizo la 21-an de Novembro respondon al ĉiuj starigitaj demandoj. Tio estas farita en formo de speciala Raporto, kiu havas 50 dense tajpitajn paĝojn kaj 66 aldonajn dokumentojn kun entute 209 pliaj maŝintajpitaj, multobligitaj aŭ presitaj paĝoj.

La Raporto pritraktas jenajn punktojn: (a) Formiĝo, strukturo kaj evoluo de Esperanto; (b) Lernolibroj; (c) Fakaj terminaroj; (d) Lernado de Esperanto; (e) Esperanto en la lernejoj; (f) Pluaj spertoj pri instruado de Esperanto en la lernejoj; (g) Koordinataj Esperanto-kursoj; (h) Katedroj kaj lektoratoj de Esperanto; (j) Beletrestiko; (k) Filozofio kaj scienco; (l) Nombro de Esperantaj libroj kaj ilia eldonkvanto; (m) Eldonejoj; (n) Gazetoj kaj revuoj; (o) Internacia disvastigo de informoj per la Esperanto-gazetaro; (p) Radio elsendoj; (q) Filmoj; (r) Poŝto kaj telegrafo; (s) Kongresoj kaj konferencoj; (t) Internacia Somera Universitato; (u) Organizo de la Esperanto-Movado; (v) Nombro de esperantistoj; (w) Malpermesoj de

Esperanto; (x) Kelkaj opinioj pri la lingva valoro kaj socia signifo de Esperanto.

En tiu ĉi laboro kontribuis per specialaj enketoj, studoj kaj raportoj pluraj kunlaborantoj de CED. Aliaj helpis per tradukoj kaj transskribado. Redakcioj de revuoj kaj gazetoj donis precizajn informojn pri starigitaj demandoj. Direkcioj de radio-stacioj donis aliajn sciigojn. Dank' al harmonia kunlaborado de ĉiuj la tasko povis esti kontentige solvita en relative tre mallonga tempo. Tial CED esprimas sian koran dankon al:

siaj kunlaborantoj: Gesinjoroj Kennedy, Sinjorino S. Sly, Prof. G. Waringhien, Gesinjoroj Holmes, Gesinjoroj Helga kaj Norman Smith, Fraŭlino E. Ford, Sinjoro W. Auld, Ing. J. R. G. Isbrucker, D-ro Solzbacher, D-ino Peter Rutschi, F-ino V. Nixon;

redakcioj de la revuoj Esperanto, Sennaciulo, La Praktiko, Heroldo de Esperanto, Scienca Revuo, Bulteno de IFEF, Oomoto, La Suda Stelo, kaj La Espero;

direkcioj de la radio-stacioj Bern, Roma kaj Zagreb.

Tute specialan dankon al S-ro D. Kennedy, kiu ellaboris la tutan parton pri Esperanto en lernejoj, kaj al S-ino S. Sly, kiu tradukis la Raporton en la anglan lingvon.



KIOM DA VORTOJ HAVAS ESPERANTO?

En la diskutoj pri la Internacia Lingvo ofte oni faras vere fantaziajn asertojn koncerne la nombron de vortoj kaj la esprimeblecojn. Prof. G. Waringhien, kunlaboranto de CED, donas jenajn precizajn informojn:

“En la jaro 1887 la lingvo havis entute 920 radikojn. La Universala Vortaro de 1894 enhavis 2.629 vortradikojn. La 6 oficialaj aldonoj de la Esperanta Akademio enhavas 1.792 vortradikojn kaj 2 novajn sufiksojn, entute 1.794. Sekve, la **oficialigitaj** vortradikoj en la komuna uzo estas 4.423 (2.629 plus 1.794). La *Plena Vortaro de Esperanto* (dua eldono) enhavas 6.900 vortradikojn kaj la Suplemento al tiu vortaro, kiu nun estas presata kaj aperos fine de la jaro, enhavas 969 vortradikojn. Entute, do, la *Plena Vortaro*—verko kun granda aŭtoritato kaj en komuna uzo — enhavas 7.869 vortradikojn. Krom la ĝenerala provizo, entenita en la *Plena Vortaro*, multajn sciencajn, filozofiajn, teknikajn kaj fakajn radikojn enhavas la 109 fakaj terminaroj kaj vortaroj, ĝis nun publikigitaj en Esperanto. La nombro de tiuj radikoj ne estas facile konstatebla.”

El la menciitaj vortradikoj oni povas formi en Esperanto—pro ĝia aglutina karaktero — minimume 80.000 derivitajn vortojn, kiuj respondas al vortoj uzataj en la naciaj literaturaj lingvoj. La nombro de ĉiuj eblaj vortoj kaj vortkombinoj, el kiuj multaj ne estas adekvate esprimeblaj en la naciaj literaturaj lingvoj, estas konsiderinde pli granda.

Tiuj ciferoj klare montras la ampleksan evoluon de Esperanto, kiu hodiaŭ plene respondas al ĉiuj bezonoj de komunikado kaj en kiu oni povas

esprimi ĉiujn, eĉ la plej delikatajn nuancojn de la penso.

Kompreneble por la ĉiutagaj bezonoj de komunikado estas necese scii nur malgrandan parton de la ĝenerala provizo de vortradikoj. En Esperanto—same kiel en la aliaj lingvoj—la individua vortprovizo, eĉ de la plej bonaj lingvokonantoj, estas kaj ĉiam estos multe pli malgranda ol la ĝenerala vortprovizo.

DONACOJ AL CED

	£	ŝ.	p.
Stato la 4-an de Novembro 1953	200	2	2
S-ro Llech-Walter, Francujo (dua donaco)	10	0	0
S-ro Tortel Jena, Francujo ..	1	0	0
S-ro Crochet, Francujo ..	1	0	0
Esperanto-Grupo, Perpignan, Francujo (dua donaco) ..	1	0	0
S-ro P. Le Brun, Svislando ..	10	0	
D-ro R. Maraury, Hispanujo ..	1	0	0
S-ro W. Baaten, Nederlando ..	5	0	
F-ino A. Petersen, Danlando ..	15	0	
C.N.N., Nederlando ..	2	0	
Stato la 4-an de Dec. 1953 ..	£215	14	2

Al ĉiuj donacintoj koran dankon. Donacojn por CED oni povas sendi al UEA, Herongate, Rickmansworth, Herts., Anglujo, aŭ al Unuiĝo Esperantista Franca, 34 Rue de Chabrol, Paris Xa aŭ al la Centro mem.

La Belarta Konkurso

La Belarta Konkurso de jaro al jaro altiras pli da valoraj talentoj, kiel oni povas konstati el la ĉiujaraj raportoj. Sed la kolektivo de la esperantistaro devas akceli la verkadon de nia nova verkistaro, legi iliajn verkojn, kaj se eble subteni ilin alimaniere. Grupoj kaj individuoj: subtenu la Belartan Konkursan per mondonaco, ke ni povu premi laŭeble plej multe da valoraj konkursaĵoj. Enpagu vian kontribuon laŭ la kutima maniero al la konto de UEA, sed kun la difino de la celo.

D-ro F. Szilägyi, sekretario.

C. C. Goldsmith :

Vagado kaj Varbado

EN julio mi konstatis, ke kvankam la membro-nombro en preskaŭ ĉiu lando iom kreskis en 1952 kompare kun la antaŭa jaro, okazis iom grava perdo en la nombro de membro-abonantoj en Danlando kaj Nederlando. Mi raportis tion al nia Estraro en Zagreb, kaj ĝi konsentis, ke mi faru prelegan vojaĝon por UEA en tiuj landoj, kun la subteno de la koncernaj landaj asocioj. Centra Dana Esperantista Ligo kaj la Nederlanda Asocio LEEN volonte konsentis, kaj mi tre kore dankas al Sinjoroj O. Lange kaj J. Telling pro la bonegaj aranĝoj faritaj.

Meze de oktobro mi vojaĝis al Danlando kaj vizitis la klubojn en Kolding, Aalborg, Odense, Vejle, Aarhus, Køge, København, Silkeborg kaj Fredericia. Tuj post mia alveno en la unua loko, Kolding, danke al la iniciato de Sinjoro Benny Nielsen, mi havis longan intervjuon kun ĵurnalisto kaj la sekvan tagon aperis granda artikolo (67cm. longan) kun foto, en la loka gazeto *Tidens Tegn*. En ĉiu loko la aranĝoj estis tre bonaj, kaj estus neeble kaj nejuste fari komparojn, sed aparte plaĉis al mi la kunvenoj en Køge kaj Silkeborg, kie ĉeestis kelkaj novaj Esperantistoj kaj la spirito de la kunvenoj estis entuziasma. En Danlando aparta plezuro por mi estis renkontiĝo kun mia unua korespondanto.

De København mi veturis trans la maron al Malmö por viziti la tiean klubon. Tie okazis la plej granda kunveno, tre bele aranĝita. Tie ankaŭ mi havis du longajn intervjuojn kun ĵurnalistoj kaj mi aŭdis ke aperis bonaj raportoj en la lokaj ĵurnaloj.



La sekretario prelegas en Vejle

Post Fredericia mi iris al Nederlando, kaj alvenis en Groningen kelkajn minutojn post noktomezo—sed spite tion, tri bonvolaj gesamideanoj renkontis min ĉe la stacidomo! Tie ankaŭ okazis du longaj intervjuoj kun ĵurnalistoj, kun bonaj kaj longaj raportoj en la ĵurnaloj. La tiea kunveno estis la plej vigla el ĉiuj, sed verdire ĝenerale regis pli da vigleco kaj entuziasmo en Nederlando ol en Danlando. Poste mi vizitis Arnhem, Amsterdam, Hagon kaj Rotterdam, kaj en ĉiu urbo la kunveno estis bone aranĝita.

Estis tro multaj kunlaborantoj, ke mi citu ĉiujn nomojn; sed mi devas esprimi specialajn dankojn al ĉiuj, kiuj bonvolis bele gastigi min; al ĉiu kiu kondukis min al aŭ de la diversaj stacidomoj, kaj al ĉiu kiu helpis en la aranĝoj. Parenteze, interesos la leganton scii, ke mi veturis en pli ol 40 trajnoj kaj nur trifoje mi renkontis personon kiu scipovas la anglan lingvon—kaj tio en landoj kie, laŭ onidiroj en Anglujo, ĉiu enloĝanto povas paroli ĝin!

Jen raporteto pri mia vagado, sed kio pri varbado? Entute mi ricevis 24 aliĝojn, kaj krome mi ricevis pli ol 40 promesojn de aliĝo kvankam tiujn mi ne petis. Ĝuste pro tio mi opinias, ke preskaŭ ĉiu promeso plenumiĝos. Kaj efektive ni jam ricevis en la oficejo post mia reveno preskaŭ 20 novajn aliĝojn el la koncernaj urboj, inkluzive de unu tute nova dumviva membro. Mi almenaŭ havas la opinion, ke mi ĉie postlasis pli bonan komprenon pri la problemoj kiuj frontas nian movadon, kaj tre simpatian sintenon por la laboroj de UEA.



*La marvirino de Hans Andersen
ĉe la haveno Kopenhago.*

Internacia Konkurso 1953

Stato je la 30a de novembro

Lando	Kvoto	Poentoj	%
1. Argentino ..	500	960	192.0
2. Italujo ..	2400	2945	122.7
3. Maroko ..	600	730	121.7
4. Germanujo ..	3200	3625	113.2
5. Aŭstralio ..	900	1010	112.2
6. Francujo ..	5200	5786	111.3
7. Aŭstrujo ..	800	880	110.0
8. Sudafriko ..	300	330	110.0
9. Hispanujo ..	1500	1616	107.7
10. Svedujo ..	5500	5921	107.6
11. Usono ..	2300	2401	104.3
12. Svislando ..	1450	1510	104.1
13. Norvegujo ..	2100	2139	101.8
14. Nederlando ..	4600	4654	101.2
15. Belgujo ..	2200	2189	99.5
16. Danlando ..	2500	2460	98.4
17. Japanujo ..	900	870	96.6
78. Jugoslavujo ..	1500	1441	96.0
19. Urugvajo ..	250	240	96.0
20. Britujo ..	10000	9482	94.8
21. Finnlando ..	2200	2065	93.9
22. Brazilo ..	6500	5828	89.6
23. Kanado ..	300	250	83.3
24. Kubo ..	250	205	82.0
25. Islando ..	450	370	80.2
26. Portugalujo ..	600	470	78.3
27. Irlando ..	250	185	74.0
28. Novzelando ..	900	635	70.5

Esperantista ferio en 1954

Ĉu vi ŝatos pasigi ferian semajnon en belega regiono en Norvegujo dum la venonta somero? En Lofthus, Hardanger, estos denove internacia esperantista restado. Jam plurajn jarojn la norvegaj gesamideanoj aranĝis ferio-semajnon en Lofthus, kaj ĝi brile sukcesis.

La restado havos lokon en Hardanger, Folkehögskule, popola altlernejo kiu situas ĉe la bela, fama Hardangerfjordo, ĉirkaŭita de majestaj altmontoj.

La kosto, inkluzive ĉiujn ekskursojn, estos norvegajn kronojn 150.

Vidu ankaŭ paĝon 13.



Tra la Libraro

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas ;
unuope ricevitajn nur mencias.

*=akireblaj ĉe U.E.A.

*La recenzinto estas libera en sia prijuĝo de verkaĵo.
Lia opinio ne ligas la Asocion aŭ la Estraron de U.E.A.*

***Antologio de Brazilaj Rakontoj,**
kun Antaŭparolo de S-ro Barbosa
Lima Sobrinho, Prezidanto de la
Brazila Beletristika Akademio.
Eldonita de Brazila Esperanto-Ligo,
19 × 14.5 cm., 305 p., broŝ. prezo
14ŝ. 6p., afranko 6p.

La antologio en Esperanto ludas
tute specialan rolon kaj atingis per
serio de imponaj verkoj apartan
eminenton. Kvazaŭ tratanĉo
transversa tra la akumuligintaj
tavoloj de krea genio en literatura
esprimo, nur ĝi vere malfermas
fenestron al la kulturo kaj tradicioj
de popolo.

La jena antologio, kiel indikas ĝia
titolo, limigis sin je unu speciala
artformo—la rakonto. Povas esti,
ke la rakonto plej konvenas por doni
al ni la stereoskopan bildon, kiu
estas la celo de antologio, precipe
kiam temas pri relative juna nacio
kiel Brazilo, kie la procezo de greftado
de malnovaj evoluintaj kulturo kaj
tradicio sur indiĝenan ankoraŭ
aktualas.

Ĉi tiu kolekto da rakontoj posedas
rimarkendan valoron, kiun ankaŭ
internacia publiko scios ŝati. Ĝi ne
estas ia kaprica elekto de individuo
alportanta al sia tasko subjektivan
kaj arbitran guston, sed kolektiva
propono de la plej alta literatura
instanco en Brazilo, de la Beletristika
Akademio mem. Tial la antologio
portas ian stampon de aŭtoritato.

La 33 aŭtoroj ĉerpis la materialon
por siaj 33 rakontoj plejparte el la
vivo enlanda kaj tial la rakontoj
efektive spegulas la pensmanieron kaj
la medion, la tumultajn pasiojn de
varmsanga popolo, la ĵaluzojn, mal-
amojn, intrigojn kaj ambiciojn de
homoj proksimaj de primitivaj kaj
naturaj fortoj. La prezentmaniero
tamen estas moderna (de la periodo
post la unua mondmilito) kaj montras
la influojn de diversaj eŭropaj kaj
usonaj verkistoj de la ĵus pasintaj du
jardekoj.

La tradukado estas malfacile
praktikebla arto, kiun malmultaj
esperantistoj vere mastris. Ĉia
traduko estas speco de rekreo, sed
kompreneblas, ke traduko devus
alproksimiĝi al la nivelo kaj kvalito
de la originalo ne nur laŭ enhavo, sed
laŭ la vesto. Se ne, oni faras malbonan
servon al la aŭtoro. La lingvo de la
jena antologio ĝenerale estas bona
kaj kolorplena. En kelkaj el la pecoj
la tradukintoj tre sukcese kreas
atmosferon verŝajne aŭtentikan.
Tamen tro oftas eraroj de elementa
speco. Ekzemple kelkaj el la traduk-
intoj evidente tute ne konas la
regulojn pri participa uzado kaj fuŝe
intermiksas *-anta*, *-antan* kaj *-ante*.
Povas esti bela teorio elekti 33
tradukintojn por la 33 rakontoj, sed
en la praktiko tio ne montriĝis virto,
kaj estas nekompreneble, kial la
eldonistoj ne faris rigoran kontrolon

de la manuskripto antaŭ ol komenci la kompostadon. La nuna nivelo de Esperanta uzado igas nin netoleremaj pri tiaj deflankiĝoj de la akceptita normo. Precipe tiaj fuŝaĵoj—facile eviteblaj—devus ne makuli tiel gravan kaj reprezentan verkon, kiel estas la jena. Aliaj verkoj aperintaj en Brazilo jam montris la vojon, do eblas.

Mason Stuttard.

***Kantante Antaŭen. Melodiario.** 5 ŝil., 15 × 11 cm., 23 paĝoj. Eldonis libroservo de CDEL.

La libro enhavas la muziknotojn de la arioj de 49 kantoj en la Dana kantlibro "Kantante Antaŭen". Ili estas fotografitaj de manfarita manuskripto kaj ne inkluzivas la notojn por instrumento nek la vortojn sub la muziko. Eble tiuj mankoj malhelpas al la nekonanto de la kantoj, sed ni tamen danku pro la ebleco lerni kaj kanti novajn alilandajn kantojn, ĉar ĉi tiu estas unu el la privilegioj kaj ĝojoj de Esperantujo.

N.H.

Esperanto-kalendaro 1954 de SAT. Ree SAT eldonis faldkalendaron (12.5 × 7.5 cm.) jam tradicion eldonaĵon. Ricevebla ĉe Sennacieca Asocio Tutmonda, 67 Av. Gambetta, Paris 20. (Prezo : 0.03 dol.)

Nia Lingvo Esperanto. Elektita poezio por deklamo kaj kantado. Unua kajero de dua serio. Karl Vanselow. Havebla ĉe Karl Vanselow, Berlin W 35, Winterfeldstrasse 27, Germanujo. 14.5 × 10.5 cm. broŝ. 2 rpk.

Jam aperis kun multa sukceso la kompleta unua serio, tri broŝuritaĵaj 32-paĝaj poŝtkartformataĵaj kajeroj. Nun oni intencas eldoni duan serion, kaj jam aperis de tiu la unua kajero. Bele prezentita libreto, kiu povas esti utilega, kiel ankaŭ la frataj

volumetoj, al kluboj tra la tuta mondo. Jen vortoj de 38 kantoj kaj poemoj kiujn gustumu ĉiu klubprezidanto—la prezo ne estas bankrotiga.

Kreskanta Kantaro. Unua kajero. 14.5 × 10.0 cm. broŝ. 2 rpk. Havebla ĉe Sinjoro S. Alexandersson, Ulricehamnsvägen 16nb, Johanneshov, Svedujo.

Kvankam ne presita, kiel la antaŭe menciita kantareto, ĉi tiu estas tre bele multobligita en formo de 32-paĝa libreto, kaj havas la saman noblan celon—konigi al eksterlandaj kluboj kantojn konatajn ĝis nun precipe en la lando de la eldoninto. El la 28 kantoj prezentitaj ĉiu trovos almenaŭ plurajn kiuj interesos sufiĉe por pensigi pri akiro de la muziknotoj.

Terminaroj de la sveda sekcio de ISAE. 21 × 15 cm. Mendeblaj ĉe Sinjoro S. Alexandersson, Ulricehamnsvägen 16nb, Johanneshov, Svedujo.

Sinjoro Alexandersson ("Eldono Salex") kiu eldonis la kajeron *Kreskanta Kantaro* (vidu la antaŭan recenzon) faras eĉ pli gravan laboron por la pliriĝigo de nia lingvo, eldonante por ISAE multobligitan serion da terminaroj sciencaj. Aperis : 1. **Aeronaŭtika Terminaro**, sveda-Esperanta. 1 rpk. 2. **Elektroteknika Terminaro**, Esperanta-sveda (kompilita de S. Alexandersson). 18 paĝoj, 3 rpk. 3. **Nomaro de Svedaj Birdoj**, sveda-latina-Esperanta (kompilita de Birger Gerdman). 12 paĝoj, 2 rpk. Aliaj landoj akiru kaj imitu !

Filozofio kaj Psikoanalizo. Eldonita de la aŭtoro, Arne Glud, Ved Sønderport 22, København S, Danlando. Multobligita, 2 rpk. 3.000-vorta registrigo de prelego farita ĉe

la dua Internacia Konferenco de Esperantistaj Studentoj kaj Altlernejoj en Ljubljana, Jugoslavujo, aŭguston 1953.

Evangelia serio eld. Esperantomissionen, Klackavägen, Nora stad, Svedujo. 14.5 × 10.5 cm.

Meritoplana serio da bone presitaj Kristanaj verketoj. 1-4, Edifoj, poemoj, preĝoj, 18 paĝoj, kune 1 rpk. 5, La Dia vojo al paco (Hubertsson), 16 p., 2 rpk. 6, Religia vivo en Svedujo (Alamo-Sandgren), 20 p., 2 rpk.

VIAJ FERIOJ, 1954

Turismaj prospektoj en Esperanto

Ni ricevis la ĉimenciitajn broŝurojn kaj rekomendas ilin al niaj legantoj. Oni povas akiri ilin senpage, skribante en la Internacia Lingvo al la adresoj indikitaj.

Tute en Esperanto

Bologna. 12-paĝa, bele ilustrita gvidfolio, presita sur luksa papero, kiu havas artan valoron kaj tre taŭgan enhavon ne nur por vizitonto, sed por ĉiu Esperantisto. Ente Provinciale per il Turismo, Via Catiglione 2, Bologna, Italujo. Klare petu la Esperantlingvan eldonon.

Etna, Marbordaro de (Riviera dell Etna). Faldprospekto kolore ilustrita, kiu informas vizitonton pri ĉi tiu ĉarma regiono. Ente Provinciale per il Turismo, Circolo Forestieri, Viale XX Settembre, Catania, Italujo.

Gent, la Monumenta. 16-paĝa bela priskribilo de la urbo kun, i.a., 22 fotoj, historia resumo kaj urboplano. Eldonita de la Urbeŝtaro de Gent. Adreso: Urba Oficejo por Turismo, GENT, Belgujo.

Hamburg. 16-paĝa tre bela broŝuro. 8 fotoj, 8 ĉarmaj kolordesegnaĵoj kaj multaj klarigoj pri kultura kaj socia vivo. Turistasocio de Hamburgo, Lombardsbrücke 1, Hamburg, Germanujo.

Hannover. 6-paĝa broŝuro kun informo pri la urbo kaj detalaj proponoj por rondpromenadoj. Ankaŭ 6-paĝa broŝuro kun urboplano (germanlingva) kaj unupaĝa priskribo en Esperanto. Städtisches Verkehrsbüro, Ernst-August-Platz 8, Hannover, Germanujo.

Parma, Urbo de Arto. 8-paĝa faldprospekto kun 10 allogaj ilustraĵoj kaj plena priskribo pri kulturaj institucioj (muzeoj k.t.p.) ankaŭ pri hoteloj kaj restoracioj. Ente Provinciale per il Turismo, Piazza Duomo 5, Parma, Italujo.

Aliaj prospektoj

Bonn. Bela 12-paĝa bildprospekto kun mallonga teksto en germana, angla, franca lingvoj kaj traduko sur aldona folio en hispana, Esperanta, nederlanda kaj sveda. Ankaŭ aparta 8-paĝa urboplano kun germanlingva klarigo, en kiu aldoniĝas folio kun priskribo de la urbo kaj de ekskurso en lingvoj hispana, Esperanta, nederlanda kaj sveda. Delegito de UEA Ernst Kind, Nordstrasse 97, Bonn, Germanujo. Bonvolu aldoni respondkuponon.

Haarlem. 10-paĝa bildprospekto kun teksto en nederlanda lingvo, de kiu traduko Esperanta aldoniĝas kiel aparta folio. Kongresanoj ricevas ĝin. V.V.V. Informa Oficejo, Stationsplein 1, Haarlem, Nederlando.

Nürnberg. 24-paĝa bildprospekto kun 20 grandformataj bildfotoj, klarigoj en lingvoj germana, angla, franca, nederlanda, sveda, hispana, itala, kaj aldono Esperantlingva, inkluzive urboplanon. Verkehrsverein Nürnberg E.V., Lorenzerstrasse 31, Nürnberg, Germanujo.

Wörgl. 6-paĝa bildbroŝuro kun informoj en germana lingvo kaj Esperanta traduko sur aparta folio. Verkehrsamt Wörgl, (Tirolo), Aŭstrujo.

ESPERANTISTA FERIO EN LOFTHUS

11-18a de aŭg. 1954

Venu pasigi vian ferion en belega regiono Hardanger en okcidenta Norvegujo! Intima, amika kunestado kun gesamideanoj el multaj landoj.

Prelegoj, diskutoj, distraĵoj. Allogaj ekskursoj.

Ĉiujn informojn donos

Okc. Distr. de N.E.L.,

Kristian Sivertsen,

Blekenberg 52,

Bergen, Norvegujo.

La Belarta Konkurso 1953

Raporto pri la poeziaj branĉoj

ANKORAŬ ĉi-jare la kontribuoj al la poeziaj konkursoj estis multaj kaj interesaj. Pri la originala parto, proponiĝis 33 pecoj el 17 poetoj, por la traduka 33 pecoj el 16 poetoj (el kiuj 7 ankaŭ partoprenis en la originala parto); entute ok landoj estis reprezentitaj. La juĝantaro konsistis el S-roj Haugen, La Colla, Rossetti, Szilágyi kaj mi mem. Se la mezvaloraj verkoj estis malfacile vicigeblaj, la ekstremaj akre distingiĝis. Ni rimarkis ankoraŭ la samajn difektojn, kiujn mi jam aludis en miaj antaŭaj raportoj: banaleco de la esprimo pro manko de elvokaj bildoj, senoriginaleco aŭ monotoneco de la rimoj, malbona elekto de tro facile sentimentala teksto en la traduka parto, k.t.p. Sed pri unu nova punkto mi dezirus tiri la atenton de la junaj poetoj, t.e. pri la uzo de la sesjamba verso. Pluraj elektis ĝin ĉi-jare, kaj ne ĉiam kontentige ĝin regis. Iam Kalocsay diris al mi, ke ĝi estas la plej malfacila verso en Esperanto: tion multaj tute ne suspektas, kiuj rigardas ĝin simpla plilongigo de la kvinjamba verso. Sed tio estas nur ŝajno. Efektive, ĉar la fonetika konsisto de nia lingvo estas trokea, ne jamba, oni ordinare faras version jamban per komenca amfibraka vorto aŭ vortgrupo, sekvata de troke-formaj vortoj; en tiaj versoj, la ritmo de la piedoj:

Hamle-to, ni-a bra-va, glo-ra re-ĝo . . .
estas kontraŭa al tiu de la vortoj:

Hamleto-, nia- brava-, glora- reĝo . . .
kaj tia kontraŭeco povas daŭri ne tre longe: la orelo bezonas, ke de tempo al tempo io rememorigu al ĝi pri la jambeco; se ne, ĝi nature

atentus baldaŭ nur al la ritmo de la vortoj. Tia regula kaj oportuna rememorigo okazas ĉe la kvinjamboj: ili estas sufiĉe mallongaj (en la Esperanta vortsistemo), por ke oni eldiru ilin per unu sola spiro, konservante la jamban svingon ĝis la versfino; kaj krome la intervalo inter du jambecaj verskomencoj ne estas tiel granda, ke oni povus ĝin forgesi. Sed la sesjamba verso estas jam tro longa por esti same traktata: neeviteble, la parolo haltas en la mezo, kreante tie fortan cezuron kaj dividante la version en du hemistikojn. Nu, la dua hemistiko, en la plej oftaj okazoj, komenciĝas per trokeo, kaj la jambeca fluo estas tie rompita. Oni efektive havas jamban verseton, sekvatan de alia, trokea—kio ŝanĝas la ritmon kaj malagrabla tuŝas la orelon:

*Mate-no de- juni-o // arda, -seka,
-glata . . .*

Jen kial la sola rimedo por savi tiun version (tutsame kiel pri la sepjambo), estas, ke la cezuro estu ĉiam vira, kio ebligas konservi la jambecon ankaŭ en la dua hemistiko:

*Mate-no de- juni'- // ardan-ta,
se-ka, gla-ta . . .*

Oni tuj vidas, kiel Kalocsay pravis, kaj kiel malfacile estus verki longan serion de tiaj vircezuraj versoj. Sed, se oni elektas tiun ritmon, oni devas alfronti tiun malfacilon. Aŭ turni sin al la sestrokea aŭ al la aleksandra verso . . .

La unua premio de la originala poezio estis atribuita al S-ro W. Auld, por la eltiraĵo el pli longa poemo "La Infana Raso". Oni ŝatas, en tiu peco, la vastan imagpovon, la

bildriĉon, la flekseblecon de la talento, kiu pasas de la altfluga inspiro al la humura familiareco; sed oni eble ankoraŭ pli estas frapata de la grandiozo de la temo.

La dua kaj tria premio iris al S-ro J. Dinwoodie, respektive por "*La Soleca Dio*" kaj "*La Granda Aventuro*". Kio karakterizas tiujn belajn poemojn, tio estas, pli ol la cetere pura kaj sendifekta formo, la intenso kaj la sincereco de la emocio, kaj tiu rimarkinda talento fari el abstraktaj pensoj karnovibranta poezion.

Trian premion *ex-aequo* ricevis la "*Renkontiĝo*" de E. Urbanová. El ŝiaj sapfaj strofoj eliĝas ia malluma, potenca pro sia konfuzo mem, atmosfero de funebro, bedaŭro kaj espero, de kiu, mi kredas, la delikataj koroj estos tuŝataj.

Fine la "*Matena Distriĝemo*" de S-ro P. Thorsen merite akiris la kvinan premion pro la moderneca, pikanta maniero trakti malnovan amtemon (eble forprenis de ĝi kelkajn poentojn la aŭdeca uzo de *luli* kaj *ritmi* kiel netransitivaj verboj . . .).

Ĉe la tradukita poezio, la unuan premion trafis denove S-ro W. Auld, kies redono de G. Chaucer (el la "*Antaŭparolo de la Virino el Bath*") indas je tiu majstro kaj per la vervo kaj per la plastikeco de la lingvo. Malgraŭ la aparta koncizo de la angla lingvo, la poeto sciis transverŝi en la Esperantajn kvinjambojn la tutan enhavon de la originalo, ne lasante senti ian ĝenon aŭ kompaktecon.

La duan kaj trian premiojn ankoraŭfoje meritis S-ro J. Dinwoodie, pro du tradukoj respektive el A. Lang ("*Eltenu mia kor'!*") kaj el A. Montgomerie ("*Admono al Junulinoj*"): venka batalo kontraŭ du malfacilaj tekstoj, el la 19a kaj el la

16a jarcentoj, kiu brile pravas neordinaran talenton de stilisto kaj de versisto.

La kvara premio estis aljuĝita al S-ro L. Minnaja, por lia bona traduko de la "*Lasta Preĝo*" de Ada Negri: liaj blankaj versoj diafane tralasas la puran lumon de la itala poetino.

La kvina premio iris al S-ro H. Fridén, kiu sciis redoni en densaj kaj potencaj versoj, la poemon de Ibsen pri "*La Ministro*".

Mi estas feliĉa gratuli ĉiujn premiitojn nome de la juĝantaro kaj, mi esperas, ankaŭ de la legantaro, se la redaktoro povos disponi iom da loko por prezenti al pli vasta publiko specimenojn el tiuj konsiderindaj verkoj, kiuj estas honoro por nia literaturo kaj riĉigo por nia lingvo.

G. Waringhien.

Postnoto de la Sekretario.

Por ke la legantaro iom ekkonu niajn leviĝantajn talentojn, mi citas la postvicajn poemojn ĝis la 12a loko en ĉiu branĉo:—

Originaloj: egale 6aj—*Homo*, de C. Graversen, kaj *Danco de Amo* de J. Francis; 8a—*Nur tri kolorojn* de Eli Urbanová; 9a—*Imagoj de amoro* de Marjorie Boulton; 10a—*Vana varmo* de Poul Thorsen; 11a kaj 12a: Jiří Kořinek per *Soneto aŭgusta*, kaj *Butono*.

Tradukoj: 6a—*Aŭroro de amo* (Bilac) de Geraldo Mattos; egale 7aj—*Baladeto* (Cavalcanti) de Giordano Azzi, kaj *Libero kaj amo* (Campbell) de Dinwoodie; 9a—*La larmo* (Junqueiro) de G. Mattos; 10a—*Himno* (Larsen) de C. Graversen; 11a—*Nimfo* (Jensen) de P. Thorsen; egale 12aj—*Amelo kaj Penoro* (Diniz) de Saldanha Carreira, kaj *Servuto* (Becker) de P. Thorsen.

R.R.



39-a Universala Kongreso de Esperanto

Poŝtfako 140, Haarlem, Nederlando

31-an julion—7-a aŭguston 1954

N-ro 3

OFICIALA KOMUNIKO

Decembron 1953

Pagoj : Rotterdamsche bank, Haarlem. Poŝtgirkonto 604997.

Pagante per tiuj kontoj nepre samtempe sendu aliĝilon kun detaloj pri la pagoj. Venis pluraj pagoj sen aliĝilo, do sen adreso.

Iuj kongresanoj pagas al peranto sed sendas la aliĝilon al Haarlem. Nepre ne faru tion. Sendu ambaŭ al la sama instanco.

Kotizo—nova periodo : La kotizo plialtiĝas en januaro 1954. Vidu la Aliĝilon. Nepre aliĝu tuj por profiti la favoran tarifen.

Studentoj : Studentoj rajtas aliĝi al la kongreso je la sama tarifo kiel por junulo (triono de la koncerna kotizo. Vidu la Aliĝilon). La aliĝilon tamen devas akompani atesto de la fakultato de la studento.

Blinduloj : Vidantoj estas petataj sciigi al blindaj samideanoj, ke por profiti la senpagan kongreskarton (ankaŭ por gvidantoj) ili devas sendi kun la aliĝilo ateston de blindula asocio aŭ de okulkuracisto. Tiu favoro validas nur ĝis fino de marto. Post tiu dato blinduloj kaj gvidantoj pagas po duono de la tiuperioda kotizo.

Blindula kongreso okazos samtempe kiel la U.K. Kontaktulo por tio estas : S-ro A. G. Verlinde, P.v.d. Doesstraat 44, Amsterdam, Nederlando.

Perantoj : Notu novan karavanaranĝon de G.E.E. (Instruistoj) en Francujo : S-ro M. Fouski, 22 Rue Gauvin, Angers, M. et L.

L.K.K. atentigas, ke en iuj landoj ekzistas oficiala peranto de la kongreso (kutime reprezentanta la landan asocion) kaj privataj karavan-aranĝoj. Tiuj lastaj peras la kotizojn nur de siaj anoj. Pro motivoj de solidareco kaj lojaleco estas ĉiel dezirinde, ke kongresanoj laboru en la kadro de oficiala aranĝo. Informon pri tio oni povas havigi al si per la koncerna landa asocio.

Statistiko (ĝis fino de novembro) : Aŭstrio 3, Belgujo 14, Brazilo 3, Britujo 86, Danujo 13, Finnlando 8, Francujo 12, Germanujo 25, Hispanujo 3, Indonezio 1, Italujo 19, Japanujo 1, Jugoslavujo 35, Kanado 2, Kostariko 1, Nederlando 206, Norvegujo 17, Novzelando 9, Portugalujo 2, Svedujo 24, Svislando 12, Usono 4. Sumo 500 el 22 landoj (pasintjare 170).

Mason Stuttard

Konstanta Kongresa Sekretario.

Kongreskotizoj ĝis 31a de marto :

Kongresano	22	guld. aŭ 40 ŝil.
Edzino	11	guld. aŭ 20 ŝil.
Junul(in)o	7.50	guld. aŭ 13ŝ. 6p.
Individuaj membro de UEA	2.50	(5ŝ.)
malpli (edzino	1.25g.	aŭ 2ŝ. 6p.)

Hans Bakker :

Nederlando, kongreslando 1954

LA antaŭa artikolo pri Nederlando parolis pri ĝia malalteco. Sekve de tiu malalteco ekzistas multaj akvovojoj, la plej malmultekostaj trafikvojoj. Ekzistas ankoraŭ alia avantaĝo de tiu multakveco. Sur malseka tero kreskas bona herbo. Bona herbo estas la plej nutra manĝaĵo por la bovinoj. Bona manĝaĵo . . . grasa lakto. Grasa lakto . . . riĉa butero kaj bonkvalita fromaĝo. En tiuj regionoj, kiuj kuŝas samnivele aŭ subnivele de la maro, troviĝas la verdaj tapiŝoj de herbo sur kiuj la sennombraj bovinoj sin paŝtas aŭ duonreve kuŝas kaj senhalte remaĉas. Paca aspekto. Sciante, ke en Nederlando loĝas dek milionoj da homoj kaj pli ol du milionoj da bovinoj oni povas konkludi, kiel grava estas ĉi tiu industrio.

Ĝis la fino de la pasinta jarcento la produktado de butero kaj fromaĝo ankoraŭ estis en la manoj de la unuopaj farmistoj. En la norda regiono, en la provinco Friesland oni ĉefe produktas buteron. En la okcidentaj provincoj Nord- kaj Sud-Holando la fabrikado de fromaĝo superregas. Tial troviĝas en la lastenomitaj provincoj la plej konataj fromaĝvendejoj Alkmaar (Nord-Holando) kaj Gouda (Sud-Holando). Tien venis la farmistoj kun siaj produktaĵoj por renkonti la komercistojn. Nuntempe la pligranda parto de la farmistoj estas membroj de kooperativo, kiu posedas fabrikon. Tiuj fabrikoj dissendas ĉiutage cistern-aŭtomobilojn por kolekti la lakton. Farmisto posedas proksimume 35 bovinojn. En la somero ili estas



Nordholanda farmdomo

dumtage kaj dumnokte eksterdome. Dum la vintra sezono, t.e. de novembro ĝis aprilo, li melkas ilin en la stalo, kie ili restas ĉu starante, ĉu kuŝante sur la sama loko. Tiam la menuo konsistas el fojno, sukerbeto kaj linsemkukoj. Por ekhavi la fojnon la farmisto jam en la somero dividas sian kampon en du partojn. Unu parton por la bovinoj, la alian parton por la fojnoproduktado.

Sude de Amsterdam la fojnejo estas konstruita eksterdome; norde de Amsterdam ĝi troviĝas interne de la farmdomo. Tial la nord-holanda havas tre altan tegmenton. La konstruo estas jena: en la mezo estas la kuboforma fojnejo. Ĉirkaŭ ĝi estas la stalo, la laborejo, la kuirejo kaj la familioĉambroj. La fojnejo estas la plej alta parto. Pro tio la tegmento, kiu kovras la tuton, havas piramidan formon. La tegmento estas kovrita per pajlo. Pajlo estas izola materialo. Tial la varmo, kiun la bovinoj mem produktas, restas endome. En la somero estas pli varme eksterdome. Tiam la pajlo izolas en la kontraŭa direkto. Tiam estas agrable malvarme en la stalo dum sunplena tago.

Sekve de la akvo la kampo baldaŭ estas marĉa precipe post pluvo. Ankaŭ la herbo ofte estas malseka de roso. Se la kamparano portus ordinaraĵn ŝuojn li certe havus malsekajn piedojn ĉar akvo penetras inter la plandumon kaj la alian ledajon. Tial li uzas lignajn ŝuojn, kiuj konsistas el unu peco da ligno. Ligno estas rezistpova kontraŭ akvo kaj tial liaj piedoj restas sekaj.


Superrigardante la kamparon oni ne rimarkas barilojn, kiuj dividas unu bienon de alia. La bovinoj tamen ne intermiksiĝas, ĉar simpla fosaĵo, kiu tuj pleniĝas de akvo, sufiĉas por evitigi tion. Por kompletigi la



aspekton, nun kelkajn vortojn pri la ventmuelilo, la nacia monumento en la nederlanda pejzaĝo.

Muelilo estas instrumento per kiu havigi al si movan forton pere de la vento. Kiam la muelisto volas funkciigi sian aparaton li kovras la brakojn per tolo. La pinto de la brakoj estas iom kurba. La akso, sur kiu la brakoj estas fiksitaj, trapikas horizontale la tegmenton. Tiu tegmento ne estas kunligita kun la domo, sed kuŝas sur radoj. Tial la tegmento povas turniĝi. Ĉar vento povas blovi de la plej diversaj flankoj, la muelisto do povas turni la brakojn al la plej oportuna direkto.

La akso povas esti kunigata kun kiu ajn maŝino, same kiel elektra motoro povas servi por funkciigi maŝinon. Ventmuelilo estas precipe uzata por pumpi akvon, mueli grenon kaj segi lignon. La vento tamen estas pli kaj pli anstataŭata de elektra forto.



Radio kaj Esperanto

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Mallongigoj : I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso.

Lundo	18.30–19.00	La Coruña. 250m. P.K. Radio Juventud, Real 71, La Coruña, Hispanujo.
	21.35–21.40	Wien. 513m., 48.74m., 25.46m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
	22.15–22.30	Hilversum. 402m. P. (nur 18-I). N.C.R.V. Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando.
Mardo	11.55–12.00	Bern. 75.28m., 48.66m., 31.46m., 16.87m. P. D-ro Baur. SRG, Kurzwellendienst, Neuengasse 23, Bern.
	14.30–14.45	Montevideo. 280m. P. Radio Ministerio Ganaderia y Agricultura, Montevideo, Urugvajo.
	15.00–15.15	Wien. 203m., 25m., 30m., 41m., 48m. P. (ĉiun duan mardon).
	17.35–17.40	Bern. 75.28m., 48.66m., 31.46m., 19.60m. P. D-ro Baur.
	22.30–23.00	Valencia. 200m. P. Radio Alerta, Colón 11, Valencia, Hispanujo.
Merkredo	15.45–16.00	Graz. 417.2m. K. (ĉiun duan merkredon) Radio Graz, Aŭstrujo.
	17.50–18.10	Roma. 49.92m., 31.35m. P. S-ro Minnaja. Radio Roma, Via Vittorio Veneto 56, Roma, Italujo.
	19.30–19.45	Barcelona. 360m. I.K. Radio Unión, Emisora del Frente de Juventudes, Barcelona, Hispanujo.
	22.15–22.20	Hilversum. 402m., 188m. I. V.A.R.A., Heuvellaan 33, Hilversum, Nederlando.
Ĵaŭdo	07.30–07.35	Lille. 218m. I. Prof. Labit, 1 rue St-Martin, Lille (Nord), Francujo.
	08.30–08.45	Paris. 348m. K. Esperanto-Office, Orléans (Loiret), Francujo.
	11.55–12.00	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	17.35–17.40	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	23.05–23.30	Zagreb. 264.7m. I. Radio-Zagreb, Jugoslavujo.
Vendredo	17.50–18.10	Roma. Kiel merkrede. P. D-ro Musella.
Sabato	08.30–09.00	Rio de Janeiro. 375m., 30.71m. K.I. Radio Ministério da Educação, Rio de Janeiro (DF), Brazilo.
	22.15–22.20	Hilversum. 298m. P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum, Nederlando.

Hispana Radio. Post transpaso de multnombraj, diversaj malhelpoj, niaj hispanaj samideanoj sukcesis starigi Esperantlingvajn elsendojn, unue en Madrid, poste en Valencia, nun en diversaj aliaj provincoj. El tiu lando venas bonegaj, originalaj programoj; ili ankaŭ estas la plej longaj, dissendante dum duonhoro ĉiusemajne el preskaŭ ĉiu stacio.

Antaŭ nelonge Madrid provizore silentis. La mezlonga ondo havis nur tre malfortan sendopovon, do estis neaŭdebla eksterlande. La alia ondo povis trapasi la landlimojn laŭ variebla fortoco.

Valencia, ĝis pasinta novembro, elsendis sur mallonga ondo kaj atingis, krom kelkaj eŭropaj landoj, Usonon, Aŭstralion, Nov-Zelandon. Multe da Eŭropanoj tamen ne sukcesis kapti ĝiajn elsendojn. Nun, la nove uzata ondlongo povas trafi nur la valencian provincon. Ni esperas, ke niaj hispanaj samideanoj povos baldaŭ retrovi pli laŭtan voĉon.

Pri la aliaj novaj programoj ni parolos la venontan monaton.

Radio Roma. 1-I, La Novjaro ; 6-I, Novaĵoj el Italujo ; 8-I, Respondoj al geaŭskultantoj ; 13-I, Italaj artistoj : Luisa Tetrazzini ; 15-I, Italaj belartaj urboj : Verona ; 20-I, Sicilia legendo ; 22-I, La Urbo de la 39-a U.K. ; 27-I, Dialogo de la Anĝelo kaj de la juna Mortinto (de Corrado Govoni) ; 29-I, Okaze de la 1a datreveno de la morto de Silvio Péllico.

Nia Forumo

PAROLAS LA LEGANTOJ



Korespondantoj nepre esprimu sin koncize kaj mallonge. Antaŭ ol sendi leteron por publikigo kontrolu la longon per komparo kun jam presita teksto.

Presigo de letero de korespondanto ne necese signifas ke U.E.A. oficiale subtenas la esprimatajn opiniojn.

“S” kaj “Z”

Dum la 38a U.K. en Zagreb okazis surprize bone vizitata kunveno, kiun nia Akademio estis kunvokinta. Dum ĝi oni aŭdis elokventajn, belformajn pledojn pri la ĝusta elparolo de diversaj sonoj k.t.p., kiuj vekis viglan debaton. Sed min amuze ridetigis la fakto, ke kelkaj el niaj lingvaj papoj ne konsciis propran malatenton al la prononcado, ekz. forviŝante la diferencon inter la sonoj “s” kaj “z”. Ĉiam min ĉagrenis, aŭdi *kongrezo* anstataŭ *kongreso*, *mezo* anstataŭ *meso*, k.a.

Mi opinias, ke ĝuste niaj modeluloj estu modelaj ankaŭ pri tiaj detaloj de nia fonetiko, por ne erarigi novajn, ankoraŭ malfirmajn adeptojn. Ne sufiĉas, ke dum kongreso ankaŭ la malzorga *kongrezo* estas ĝuste komprenata, ĉar tiu ĉi malzorgo pri la korekta, laŭfundamenta elparolo ofendas la orelojn de ĉiu modesta esperantisto, kiu lernis la lingvon laŭ la reguloj de Zamenhof. Kaj ĉi tiuj tre klare diferencigas “s” kaj “z”.

D-ro A. Halbedl.

La amuzaj programoj de niaj universalaj kongresoj

Jam de multaj jaroj la oficialaj amuzaĵoj de niaj universalaj kongresoj parte ŝanĝis sian karakteron, prezentante al la diversnacia kongresanaro ĉiam pli amplekse nur *naciajn* interesaĵojn de la lando, en kiu la

kongreso okazas. Dum ekz. en Dresden 1908, en Barcelona 1909, Nürnberg 1923 oni prezentigis per profesiaj aktoroj dramojn kun pure homa tendenco (*Ifigenio en Taŭrido*, *Mistero de Doloro*, *Natan la Saĝulo*) en aliaj kongresoj internaciaj tiaj imitindaj faroj ne okazis; ili estas ĉiam pli anstataŭigataj de naciaj prezentaĵoj, kelkfoje ne tute kompreneblaj eĉ komentariite. Kompreneble ĉi tiuj havas sian grandan valoron kaj ne tute manku en niaj kongresoj. Ili meritas ĉies interesiĝon. Sed niaj universalaj kongresoj havas ankoraŭ speciale propagandan destiniĝon, kaj veku kaj disvolvu en la partoprenantoj la tuthomajn aspirojn kaj intencojn, montru la sorton de la homo ĉiutempa kaj ĉiulanda, bildigu la homon estontan, la civitanon de la nova mondo. Ili pruvu al la ĉiamaj skeptikuloj la taŭgecon de Esperanto ĝuste por tiu ĉi eduka tasko kaj, ke la esperantistoj fakte havas ion specialan por diri.

Tial la kompilantoj de la ekstertraktadaj programoj de la U.K. klopodu, pri vere homaraj prezentaĵoj kiel ekz. estus tiu de *Sappho* de Grillparzer, *Tragedio de l'homo* de Emeriko Madács, *Hipoĥondro* de Molière k.a.

Eksciinte, ke oni povas bonfamigi kaj mongajni per Esperanto dum

daŭrigo sur paĝo 27

E. D. Durrant :

La Plua

Disvastigo de la Internacia Lingvo

Sociologia Analizo

(Resumo de prelego farita ĉe kunsido de Brita Esperanta Scienca Asocio la 17-an de Februaro, 1953, en University College, Londono. S-ro Durrant estas Komitatano de U.E.A. kaj de B.E.A.)

SCIENCE analizi tiel socie vastan fenomenon kiel internacian lingvon estas en si mem malfacile. Sed malgraŭ tio, miaopinie estas tre necese fari tion. Por tio mi rigardos la aferon el sociologia vidpunkto, ĉar lingvo estas socia fenomeno, kaj internacia lingvo estas aparta fenomeno de nia epoko.

Forpasis iom pli ol duonjarcento de kiam aperis Esperanto—duonjarcento plej eventoplena en la historio de la homaro. Eventoj fakte sekvis unu la alian tiel rapide, ke eble ne ĉiu el ni plene konscias la sinsekvajn etapojn de la evoluado. Ni emas rigardi al la efiko de moderna civilizo sur la vivkutimojn de la indiĝenoj en foraj landoj, ĝia rompo de tribaj moroj kaj tiel plu. Ni tamen evitas rigardi al ni mem, precipe el internacia vidpunkto, por vidi kiel la tekniko influas kaj ŝanĝas nian tutan socian pensadon kaj agadon. La ŝanĝo estas neevitebla.

Nu, ni iomete analizu la mondon en kiu Zamenhof lanĉis Esperanton. Kia ĝi estis? La unua duono de la 19-a jarcento estis periodo de konstante progresanta tekniko. La vapormaŝino havis kiel rezulton la rapidan transporton pere de vagonaroj kaj ĉiam pli grandaj ŝipoj. Regis sento de espero kaj progreso, tinkturita de kvazaŭ-religia kredo, ke ĉio en la mondo tendencas al pliboniĝo. Krome, estis homoj kun klereco, mono kaj libera tempo—

rentuloj, homoj mallaŭdataj de la novaj politikaj doktrinoj.

Zamenhof forte ensorbis tiun deziron por plibonigo de la mondo. Li estis filo de sia epoko. Samtempe li vidis la malbelajn flankojn, malamon inter homgrupoj, kion li atribuis al lingva malsimileco. Tio devas esti venkata. Oni rimarku, ke en tio ĉefe regis la sento strebi al io pli bona. Per tiu spirito Zamenhof atingis aliajn homojn de sama sento.

Eble eĉ pli interesa estas la nivelo de klereco en kiu agis tiuj fruaj pioniroj. La tiel nomata “universala klereco” estis nun en sia unua ŝtupo. Novaj idealistaj ideoj dependis de la energio kaj kvalitoj de homoj el la edukitaj tavoloj, homoj kun, ĝenerale, iom da libera tempo, relative sufiĉe da mono por ĝui klerecan vivon, sed samtempe sen tia troo kia estus loginta ilin laŭ vojoj pli plezuraj.

En tiu tempo unu klera homo povis doni efikon al sia influo relative simple. Prelego en ĝusta societo, presigo de artikolo en ĝusta loko, kaj tiel plu, donis relative bonan rikolton. Ankoraŭ ne venis la tempo de amasaĉetado de tagĵurnaloj, radio, televido kaj multaj iloj de amaskomunikado.

Socie tiu epoko estis eĉ pli malsama al la nia ol ni kredas. Ĝi estis periodo de individuoj; la unuopuloj ludis rolon neĝenate de unu fenomeno de la moderna tempo, nome komitatoj,

konferencoj, grandaj unuiĝoj, unuvorte sen la sociaj faktoroj kiuj estas necesaj—aŭ almenaŭ konstante ĉeestaj—en la nuna mondo.

Estas interese rimarki, ke estas dubinde ĉu la mondo en kiu aperis Esperanto vere en tiu momento bezonis ĝin. Regis en altaj klasoj la franca lingvo; krom ĝi estis nur la angla, germana kaj rusa. Ĉiuj aliaj lingvogrupoj devis kleriĝi en tiuj lingvoj pro neceso aŭ devigo. Amas-turismo kaj internaciaj konferencoj de ordinaraĵoj homoj ne ekzistis. Anoj de la laboraj kaj mezaj klasoj apenaŭ sentis la neceson veturi. Ĝenerale regis nescio pri aliaj landoj, aŭ ŝovinismaj sentoj. Entute, la psikologia fono ne estis tia en kia oni atendus la kreskon de nova planto kia estis internacia lingvo. Tamen, la nova ordo estis ensia frua printempo, kaj Esperanto estis kiel floro aperinta el sub neĝa tavolo. Estas notinde, ke ĝi fakte altiris al si sufiĉe grandan atenton, kaj eĉ se Esperantistoj ne leviĝis ĉiufanke, la nomo de la lingvo rapide penetris, kaj la signifon idean de la lingvo multaj miloj da personoj komprenis en ĉiuj landoj.

Kiam ĝi estis nur 20-jara ĝi renkontis la unuan venton de la nova mondo. Batalantoj por la ideo de internacia lingvo konsciis ke estus bone ricevi internacian apogon de ia kvazaŭ-oficiala imponeco. Sed, kiel organizi tion? La registaroj ankoraŭ ne aplikis tiun metodon de internaciaj kongresoj por diskutado aŭ disputado. Estis nenia internacia organizaĵo al kiu turni sin kun peto apogi Esperanton.

La tiutempaj gvidantoj elpensis la ideon de la famaĉa Delegacio (1907) por diskuti kaj decidi pri la elekto de internacia lingvo. Ĝi estis provo de internacia konferenco, hibrido de

multaj ideoj ankoraŭ neprovitaj en la ekstera mondo, kies celo devus esti objektiva elekto de lingvo. Studantoj de la historio de la temo bone scias en kiajn marĉojn ĝi enfalis.

La socio tiutempa estis nematura rilate al internaciaj konferencoj ĉar mankis la necesa kompreno pri disciplino, ĝusta protokolado kaj organizado kaj tiel plu kiujn postulas konstitucie justa funkciado.

La Delegacio estis fakte teatra spektaklo, kun mirigaj personaro kaj tensioj, intrigoj, miskomprenoj kaj dramoj, kies rezulto estis pli da malfido kaj miskompreno pri la temo ol iam ajn antaŭe. La notinda rezulto estis Ido, infano de nekonata patreco. Dum jaroj estis lukto pri la kvalitoj kaj meritoj de tiu nova lingvo, al kies estonta intereso dediĉis sin multaj elstaraj personoj, disputante inter si. Parenteze ni notu ke moderna paralelo kun ĉi tiu fiasko de la Delegacio estas la provoj de IALA krei mondlingvon per enketoj ĉe lingvistoj.

Historie, tamen, la Delegacio signis gravan paŝon en la evoluo de la ideo de internacia lingvo. Eble tiu Delegacio historie kaj socie estis pli grava ol ni povas eĉ nun supozi. El ĝi naskiĝis ne nur Ido, sed eĉ pli grave, ekburĝonis la nova spirito de la Esperantistoj. Ĝi estis la unua provo de la nove fondita tradicio de la Esperanta movado, nome de la Deklaracio de Boulogne-sur-Mer (1905). Brilaj sed eble iomete temperamentaj personoj retiris sin, ĉiu al sia preferata faceto de la afero, dum la ordinaraĵoj—kaj ne nur la ordinaraĵoj, sed la respondecaj kaj klarvidaj personoj restis ĉe Esperanto. Nubis la ĉielo, sed ili restis fidelaj. La spirito de la Esperantistoj hardiĝis. Esperanto fariĝis pli firma socia fenomeno.

Ankoraŭ restis multo por fari. La literaturo estis nur bagatela. Estis ankoraŭ diskutoj, eĉ disputoj pri la demando, ĉu aŭ ne oni verku originale en Esperanto. La internacia organizaĵo ankoraŭ ne estis firma, sed U.E.A. estis ja fondita. Tiutempe preskaŭ la sola ĝeno estis la pikado de la Idistoj; ne necesis gardi sin kontraŭ aliaj faktoroj en la socio—jen tia estis la iluzio de progreso. Estis kvazaŭ oni ĵus alboriĝis al nova lando—lando sen kontraŭstarantoj, kun loga pejzaĝo kaj promesanta bonan koloniadon. Nur necesis labori trankvile, ĉar la problemojn de la fora hejmlando oni postlasis kun ĝi trans la maro. Sed, la vero estas kaŝita; kontraŭaj fortoj kaj rezistoj leviĝis tre baldaŭ, fortoj kiuj ŝanĝos la konstruon de la socio kaj necesigos aliigon de taktiko kaj pensado.

La Milito

Sep jarojn post la Delegacio de 1907 ekflamis Mondmilito—fulmotondro kaj detruo el preskaŭ klara, blua ĉielo. Per unu bato la psikologia bazo de la tuta homa socio, ne nur de la trankvila okcidento, estis detruita. Ruino, mizero regis dum kvar jaroj. Tiu brulado de homaj pasioj kaj fortoj alportis grandan ŝanĝon en la atmosfero, ŝanĝo kun speciala signifo por la ideo de internacia lingvo kaj aparte por la Esperantistaro.

La furiozo tamen brule elĉerpis sin kaj sur la cindrigita mondo kreiĝis aliaj sociaj aranĝoj. La reago de vunditaj korpoj kaj kontuzitaj mensoj postulis provonevitiplian katastrofon. Naskiĝis la Ligo de Nacioj. Kun ĝi estis multaj aliaj internaciaj organizaĵoj ĉiuspecaj, oficialaj kaj privataj, komercaj kaj bonfaraj.

Ek de 1918 komenciĝis la formiĝo de nova, internacia, mondo. Sed ĝi estas mondo de konfliktaj potencoj kaj ideologioj. La internacia socio ne estas kunligata de ia valida internacia koncepto aŭ ideologio, kiel estis siatempe la roma imperio aŭ Eŭropo dum la frua tempo de la hegemonio de la romkatolika eklezio. La ideoj de la rusa revolucio, la liberiĝantaj koloniaj popoloj, la socia forto de homoj ekster la intima okcidenta-rondo, ĉiuj kune kun multaj aliaj luktis inter si, ne esence por monda hegemonio, sed por limigitaj celoj, kiel ekzemple aŭtarkio. Ĉiu povas emfazi jen tiun, jen tiun ĉi eventon laŭ sia inklino kaj fono, kaj vere analizado de tiaj fortoj kaj tajdoj estas ekster mia tereno. Mi devas nur observi ilin kiel la konsistigaj eroj de la ideo fono de la nova socio, kaj provi konstati kiel la Esperantistaro adaptiĝas al la bezono ekzisti kaj progresi.

La Ligo de Nacioj

Jam frue post la unua mondmilito la Esperantistoj sukcesis mobilizi grandan klopodon, kun la rezulto, ke la Ligo de Nacioj adoptis Raporton favoran al Esperanto en 1922. La historio de ĝia neplenumiĝo estas legebla en kiu ajn serioza pritrakto de tiu periodo. Bedaŭrinde la analizo de la kaŭzo ne estis tiutempe farata. Fakte, mi dubas ĉu la Esperantistaro ankoraŭ sufiĉe konscias kion tio signifas, kaj kion signifas la nuna situacio de nia afero antaŭ la nova internacia instanco, UNESKO.

Ili ne konscias, ke socie nia movado estas lerninta ion gravan, kaj ke la Esperanta movado jam fariĝis faktoro tute alispeca. Mi mem fakte ne konsciis la kernon de la afero ĝis, dum la pasinta milito, mi estis verkanta

*The Language Problem.** Subite mi vidis la kaŭzon de nia katastrofo ĉe la Ligo de Nacioj. La Esperantista movado kreskis el idealismo en mondo kie ankoraŭ ne troviĝis aliaj internaciaj organizaĵoj kompare kompaktaĵ kaj organizitaj.

La Ligo de Nacioj estis kreata post la unua mondmilito, kaj per fortoj tute super la kapo de la Esperantistaro. Ĝi kreiĝis per la fortoj kaj rimedoj de registaroj kun siaj grandaj financoj kaj riĉeco en personoj. Ĝi ne estis afero de volontuloj, homoj kiuj laboras por io en siaj liberaj horoj, sed strukturo dependanta de salajrataj funkciuloj kun la tuta armilaro de la moderna tekniko kiel apogo. Sed mankis ilo por venki la lingvajn barilojn.

La Esperantistaj gvidantoj de tiu epoko ne estis kulpigeblaj pro la rezultoj, ĉar la fiasko tiutempa estis naskito de la tiama sistemo kaj pensmaniero. La homoj kredis, ke post tiu terura katastrofo homoj de bonvolo regos la mondon kaj kondukos ĝin al paco kaj oro—almenaŭ kelkaj homoj tion kredis.

Nun ni vidu kiel staris la demando pri Esperanto. Unue, la Ligo de Nacioj adoptis la raporton. Tiam ĝi sendis ĝin al la Komitato por Intelektita Kunlaborado por ĝia opinio nur pri unu punkto—Esperanto en la lernejoj. Tie okupis sin pri la afero malgranda koterio da homoj elstaraj pri ia filozofiaj verkoj—sed neniu Esperantisto. Tuj trafis la Esperantistojn grava socia faktoro: nome, ke homoj, kiom ajn kleraj, en komitato estas kapablaj diri la plej stultajn aferojn sen ia bazo krom antaŭjuĝo. Ili tion faris, kaj provis damni Esperanton. La mensostato de tiu

koterio estas komprenebla nur se oni memoras, ke tute serioze unu el ili opiniis, ke la amaso ne ĝenu sin pri internacia interkompreno. Ili fidu al sia nacia elito agi kiel perantoj.

La socia leciono? Se la adeptoj de Esperanto havas la volon kaj kapablon konduki sian lingvon al sukceso ili devas neniam denove lasi sin esti juĝata sen ĉeesto. Ili devas adaptiĝi al modernaj sociaj kondiĉoj kaj *lukti por la rajto sin reprezenti en kiu ajn esplorado*.

Tio eble klariĝos al tiuj el vi kiuj konas la historion de nia afero dum kaj post la ĵusa milito. Ili memoros, ke en niaj luktoj kontraŭ Basic English, pri kiu mi okupiĝis en la nomo de la Brita Esperantista Asocio, ni aplikis ĝuste tiun taktikon. Ni demandis al la Komitato de la Brita Kabineto kial ĝi ne publikigis la nomojn de la spertuloj konsultitaj, kaj kial ĝi ne invitis Esperantistojn doni sian ateston. Alian fojon, plifrua, dum la milito, la edukaj ministroj de aliancaj potencoj en Anglujo kunvenigis komitaton por konsideri rekomendojn pri internacia helplingvo, ĉefe kun la motivo doni apogon al Basic English. Ĉi-foje aperis eraroj pri Esperanto. Ankaŭ tiun fojon ni atakis kaj demandis kial ili ne akceptis Esperantistajn atestojn. Kompreneble ni ne atingis evidentan sukceson, sed ni akiris informon el la korespondado kiu poste utilis, kaj entute el tiuj unuaj provoj niaj venis multo.

Ni notu ankaŭ, ke ni utiligis la kreskantan rekonon de fundamento, la scienca pensmaniero—la observo de faktoj. Dum tio evidentiĝis alia socia fenomeno. Malgraŭ ĉiu provo dronigi Esperanton tio montriĝis neebla. Ĝia valoro kiel lingvo estis agnoskata de ĉiam pli grandaj tavoloj

* Anglalingva libro pri la lingva problemo (1ŝ. 3p. afrankite).

de homoj. Tio estis por ni tre interesa simptomo. Sufiĉe ofte mi devis intervjui homojn en iom delikataj cirkonstancoj el nia vidpunkto, ĉar temis pri defendo ne de la lingvo sed de la rajtoj de la parolantoj de la lingvo. Tiam mi trovis, ke kontraŭuloj de nia lingvo fakte estis multe malpli ol ni kredis.

La tiutempe nefavora situacio de Esperanto venis ne de ajnaj lingvaj mankoj, sed ĉar ni forestis dum la konsideroj kaj ne povis defendi niajn rajtojn. Tiu periodo de ŝajna malfacilo reprezentis grandan evoluon en nia socia pozicio. Repuŝite sur niajn kalkanojn, ni povis tamen ankoraŭ resti starantaj kaj defendi nin kun ŝancoj de finfina pliboniĝo de pozicio.

Nuntempaj tendencoj

Sed, ni rimarku, ke tio estas ebla nur sub unu kondiĉo. Se la ĝenerala homa socio agnoskas la dezirindecon de internacia interkompreno, kaj samtempe neniu nacio intence celas kulture subigi aliajn, tiam Esperanto povas vivi kaj fine flori. Sed la vorto, 'fine' devas esti komprenata en la ĝusta senco. La fina plenumiĝo dependas de sociaj tendencoj kiuj ankoraŭ ne tute maturiĝis.

Samtempe teknikaj eltrovaĵoj kreas cirkonstancojn kiuj ŝajnas ne esti favoraj por Esperanto. Ni devas memori, ke la cetera mondo sukcesas konduki siajn aferojn sen nia lingvo. Ni scias kiel malfacile ĝi tion faras en unu rilato, sed ni foje emas trograndigi tiujn malfacilojn. Multaj personoj en internaciaj organizaĵoj apenaŭ konscias kia estas agado sub aliaj kondiĉoj, sub kondiĉoj de unulingveco. En tio la socia mensostato ankoraŭ ne atingis la stadion por la necesa proksima paŝo. Malgraŭ tio, ĝi rapide marŝas en tiu direkto.

Ni ne atendu, ke la kompreno venos

aktive de la ordinara homoj. Konfesinde ili amase vojaĝas eksterlande, sed ĝenerale al unu aŭ du aliaj landoj, elektante laŭ sia kompreno de la lingvo aŭ laŭ la bona organizo de la turista industrio, kies karavana sistemo maskas la problemojn.

Ne, la nova penso devas veni de la praktikantoj de la nova internaciismo. Kiel aferoj nun statas tio ne estas facila. Tiuj homoj disponas pri poliglotaĵoj sekretarioj, la Finlay-tradukstemo de porteblaj radioriceviloj agordeblaj al certaj traduklingvoj kaj tiel plu. La tuta tradukstemo estas teknike mirinda, malgraŭ ĝiaj fojaj eraroj kaj malgataĵoj. Konferencoj funkcias per amasoj da dokumentoj kaj informoj en ĉiu el la oficialaj aŭ laborlingvoj. Ĉio bremsas rektan publikan diskutadon. Konferenco tia tute ne similas al parlamento aŭ la ordinara konferenco unulingva kie plejgravas la parolata vorto.

Eble valoras memori, ke nia teknika civilizo evoluas laŭ du vojoj, reciproke komplementaj sed kontraŭaj. Je unu flanko la radio, kinematografio kaj televido redonas valoron al la parolata vorto kaj la vida percepto. Aliflanke, la tuta sistemo dependas de ĉiam pli da dokumentoj, protokoloj kaj raportoj, necesiganta amasojn da multobligo. Papero fluas kiel riverego en ĉiu lando. Nur la papere komunikata vorto estas la vera fundamento de la kutimaj plurlingvaj internaciaj konferencoj.

Nia nuna problemo

Mi tamen kredas, ke la avantaĝoj de internacia lingvo estas tre vaste rekonataj, sed la mondo nur pretas interesiĝi pri aferoj kiuj donas fruan profiton aŭ avantaĝon. Nia nuna problemo estas impetigi ĝian disvastiĝon tiel forte ke la tujaj

avantaĝoj estos al ĉiuj evidentaj. Jen la nova ŝtupo antaŭ kiu ni staras.

Do, ni vidas, ke nia evoluo lastatempe estis rapida en la senco, ke ni perceptis la eksterajn cirkonstancojn kaj adaptis nian sintenon laŭ ili. Estas jam parto de nia taktiko, ke ni ĉiam celas esti reprezentantoj mem kiel spertuloj pri nia afero.

UNESKO akceptis—devis akcepti—tiun premison dum la konferenco en Parizo, 1952. Malgraŭ ĉiu ŝajna promeso agi laŭ tiu koncepto ĝi fakte evitis, eble senintence, inviti nin sendi reprezentantojn. Ni agis laŭ la socia formulo de nia tempo kaj postulis ĉeeston, lasante nenian dubon, ke se ili ne donos tion ni faros ĉion eblan por proklami la socian eraron, eĉ per diplomatiaj rimedoj. La konferenco devis decidi dum sia sidado doni observan rolon al du reprezentantoj de UEA—nome D-ro Lapenna kaj mi.

Tio estis ebla, ĉar la strukturo kaj adaptiĝemo de la nunaj internaciaj organizaĵoj disponas pri tiaj vojoj laŭ siaj konstitucioj. Ni konstatas do, ke kompare kun la tagoj de la Ligo de Nacioj ambaŭ flankoj estas en pli evoluinta socia stato, kio ebligas al ili finfine pli efike kunlabori. La tempo marŝas, kaj ĉi-foje ni ne tiom postrestas kiom post la unua mondmilito.

Nun ni devas rigardi al ni mem iomete. Unue mi diru, ke parolante pri internacia lingvo mi pensas nur pri Esperanto, ĉar estas mia konvinko, ke ĝi estas la sola kun ebleco de sukceso. Mi ankaŭ estas certa, ke ni devos plenumi nian rolon en la historio, kio postulas de ni multon. Proporcie al niaj rimedoj kaj fortoj ni estos tre streĉitaj dum minimume kelkaj jaroj.

Nia ĉefa problemo konsistas en tio, ke ni estas ĉiuj amatoroj. Ni luktas

per niaj propraj korpoj kaj poŝoj. Nur en niaj liberaj horoj ni povas batali. Ni klopodas en mondo kie regas troo da komitatoj. En la komitatoj estos decidata nia afero. En ili estos decidataj la proksimaj paŝoj. En ili estos decidataj paŝoj, kiujn nur ni amatoroj povos plenumi dum kelka tempo—ĉar ne estas sufiĉe da salajrataj personoj kiuj scias Esperanton por tion fari. Malica rondo aŭ spiralo !

Elstara ekzemplo de tio estas la aviada mondo. Ege necesa estas la solvo de la problemoj rezultantaj el la uzado de la angla lingvo kiel internacia. Oni provis ĉiun vojon konstrui novan lingvon kiu ne estos tro for de la angla lingvo laŭ strukturo kaj sekve, teorie, facile enkondukebla. Ĉiu paŝo malprosperas. Komitatoj sidas. Komitatoj decidas. La aviadtrafiko flugas kiel antaŭe, kaj la problemoj estas nesolvitaj. Internaciaj komitatoj fluge kunvenis de ĉiuj partoj de la mondo—same malsukcesaj estas iliaj 'sciencaj' esploroj kaj artifiko. Ili ja foje opinias, ke Esperanto estus bona se ĝi estus jam en florado, sed ke ĝia enkonduko estus tro granda paŝo por preni en la nunaj cirkonstancoj—kaj kiu povus sincere riproĉi ilin? *Pli bone la diablo konata ol la diablo nekonata.*

En la nuna momento ni ne estas sufiĉe fortaj por venki tiujn vere praktikajn problemojn de enkonduko.

Alia sfero estas la Eŭropa armeo. Se Esperanto estus instruata en la lernejoj la armeaj administrantoj sendube bonvenigus ĝin. Sed la eduka sistemo lamas.

Kaj tio kondukas nin al alia interesa punkto: la uzado de komuna lingvo en armeo ne estus limigita al la oficista tavolo sed estus ankaŭ necesa amasgrade inter la ordinara

soldatoj—la produktaĵo de la moderna amasedukado. Kvankam la antaŭa pli elita edukado bone inkluzivis la studadon de modernaj lingvoj oni apenaŭ povas atendi, ke tia studado egale bone sukcesos en la pli mallarĝa stud-programo de amasedukado—kiu cetere nepre devus enhavi en sia limigita amplekso almenaŭ iom da elementa scienco. Sed ĝuste tie povus sukcesi la pli facile lernebla, ne tiom temporaba Esperanto. Fakte jam en Anglujo ni vidas signojn en iuj rondoj de preteco agnoski tiun aspekton de la afero.

La rolo kiun jam ludis, kaj ludas, ĉi-sama faktoro en nia movado estas evidenta. Al ĝi ni ŝuldas la fortikajn enpopolajn kulturajn radikojn de la movado—kiel ankaŭ la proporcie grandan nombron de la Esperantistaro kiuj volonte kaj kapable povas verki en la lingvo. Pri la naciaj lingvoj estas alie: milionoj studas ilin en lernejoj kaj universitatoj, sed ege malmultaj kapablas verke uzi ilin. Finfine tio nepre havos pluan influon.

El nia esploro ni povas konstati, ke nia granda problemo estos ĉi tio, ke ni devas lukti en nia malmulta libera tempo ne nur sen, sed eĉ kontraŭ la influo de la lerneja sistemo. Oni ne atribuu al tiu sistemo ian malŝaton de Esperanto. La baza problemo estas, ke ĝi ankoraŭ ne estas agnoskita. Post oficiala rekono la lingvo funkcios en tute alia atmosfero—en alia socia medio—kaj espereble multaj el ni ĝisvivos tiun fazon.



Nia forumo : daŭrigo de p. 20

niaj universalaj kongresoj en la tuta mondo samtempe, la esperantistoj inter la artistoj baldaŭ abundos. Pri la bonfara sekvo de tia nova situacio de nia movado vi cerbumu mem, kara leganto.

D-ro A. Halbedl.

Ĉiuokaze

Sur p. 359 de la decembra *Esperanto* mi legis “korekton” kiu ne estas korekto; *ĉiuokaze*=(angle) on each/every occasion. Por redoni *in any case*, kaj *en iu okazo* kaj *ĉiuokaze* ne taŭgas. Por tiu ideo Zamenhof kaj bonaj uzantoj skribas *estu kiel ajn* aŭ (laŭ cirkonstancoj) *cetere*. La formo *ĉiuokaze*, kiu en la lastaj jaroj entrudiĝis en la uzadon, estas mistraduko de anglaj esperantistoj.

Mason Stuttard.

ESPERANTISTA VIVO

Naskiĝoj

Postl. Al gesinjoroj Alois Postl (Döllach 11, Post Au bei Aflenz, Ob. Steiermark, Aŭstrujo) naskiĝis filo Herold, je la 10 de Novembro, 1953.

Al ili ni esprimas sinceran gratulon.

Niaj mortintoj

Ni eksciis pri la forpaso de la jenaj samideanoj, al kies parencoj ni volas esprimi nian profundan kondolencon.

Andrew, Stephen A., konata tradukinto de pluraj verkoj de Shakespeare kaj Schreiner en nian lingvon, mortis en Sea Point, Sud-Afriko la 14an de Novembro, 75-jara.

Daly, Fraŭlino Eileen de Burgh, mortis la 10an de Novembro en Okehampton, Anglujo. Ŝi havis grandan intereson pri nia originala literaturo kaj, mem verkante, gajnis la unuan premion de la Belartaj Konkursoj 1952 por Originala Dramo.

Marcelé, Edouard, vicprezidanto de la Grupo Esperantista de Bordeaux, mortis en Novembro. Li instruis la lingvon dum 25 jaroj.

Tilly, David S., nia delegito en Whangarei, Novzelando, mortis en la aŭtuno je aĝo 86.

Oro en Klorofilo

KIAM mi estis junulo—antaŭ multaj jaroj—kaj iu konato rakontis ian nekredeblaĵon, la kutima laŭmoda respondo konsistis el fingromontro al la dekstra okulo, kaj demando: “Ĉu en mia okulo vi vidas ian verdaĵon?”

Tiu “verdaĵo” sendube tiris sian signifon en la verde de ekkreskanta herbo, juna, freŝa kaj ankoraŭ ne makulita de la vivo; aŭ kiam oni aplikas la priskribon al homa estaĵo, *naïva*. Ankoraŭ nun la freŝbakita knabskolto ricevas titolon “Verdulo”.

La arto de la nuntempa reklamisto konsistaŝ el la ekspluatado de tiu verdeco, tiu naiveco de la meza homo, kaj la fakto ke la meza homo ricevas ŝtatprovizitan edukadon apenaŭ helpas lin. La reklamisto akiras la subtenon aŭ de iu “saĝulo” aŭ de iu “sciencisto”.

Antaŭ kelkaj jaroj, ekzemple, oni ofte vidis en la gazetoj reklamon, en kiu oni legis kiel en iu malproksima kaj preskaŭ neatingebla parto de Sud-Ameriko, maljuna Aztek-indiano, tuj antaŭ la morto, flustris la sekreton de mirinda medikamento; sekreton, kiun lia familio heredis tra multaj generacioj. Kaj nun, pro sento de sankta devo, la reklamisto pretas transdoni tiun sensacian sanigilon al iu ajn, kontraŭ pago de ridinde malalta sumo de kelkaj ŝilingoj.

Sed lastatempe la modo ŝanĝiĝas, kaj la amiko de la reklamisto estas la sciencisto. Per misteraj formuloj, latinaj nomoj, aludoj al penicilino, radio-aktiveco, k.t.p. la lerta komercisto konvinkas la simplan civitanon unue, ke li estas, aŭ baldaŭ estos, malsana, kaj due, per helpo de

la plej modernaj eltrovaĵoj de la scienco li estas kuracebla . . . kontraŭ modesta pago.

La farmaciisto rikoltas ja kontentigan profiton, la civitano amasigas tutan kolekton da medikamentoj, kaj la meblisto kun ĝojo vendas tre belaspektajn ŝrankojn en kiuj la civitano povas konservi sian kolekton.

* * *

Plej feliĉa afero por la komercistoj estis la konstato de sciencistoj, ke en iuj cirkonstancoj iuj derivaĵoj de klorofilo (Greka formo de *verd-folio*) nuligas odorojn. Tuj ili preparigis specialaĵojn kontraŭ odoroj en la kuirejo kaj en la necesejo, kontraŭ odoroj de la korpo kaj de la spiro, k.t.p., kaj baldaŭ mondscale multobligis la vendolokoj kaj la profitoj.

Dum la plej febre aktiva periodo de la vendado la laboratorioj ne povis sufiĉe rapide prepari la klorofilon. La sukceso estis vere eksterordinara, precipe en Usono. Tie la ŝercgazeto *New Yorker* presigis bildon de flor-butiko, en kies montrofenestro granda afiŝo tekstis “Ĉiu planto nia enhavas klorofilon!”

Tamen la ĝenerala opinio nun estas, ke la vendistoj troigis siajn pretendojn, kaj sekve klorofilo ne plu estas tiom aĉetata kiom antaŭe. Oni nun ne tiom avide aĉetas klorofil-enhavajn ŝaŭmsapon, cigared-filtrilojn, aerpurigilojn, tualet-paperojn, enŝuajn plandkusenojn k.t.p., kvankam ankoraŭ facile vendiĝas dentpurigiloj.

*Ĉe bord' de rivero la Nilo
ekridis larg'-buŝa krokodilo.
La dentoj ja blankis,
pri kio ĝi dankis
manĝaĵon de past-klorofilo !*

Mi ne povas garantii la verecon de la rakonto, sed mi aŭdis, ke dubo ekevidentiĝis kiam iu bone konata bilingvisto falis en kuvon de klorofilo . . . tamen daŭre odoraĉis !

Kio ajn povas esti la vera kialo, estas neniam dubo, ke la "mirinda medikamento" de la sciencistoj ĝuis nur efemeran sukceson.

* * *

Ĉu mi povas kapti la okazon por altiri vian atenton al eksterordinara beligilo por elegantaj sinjorinoj, kies sekreto mi posedas ?

Dum esplorado en Norda Afriko mi renkontis reve-ravan Tuareg belulinon kiu, interŝanĝe por neuzita porcio de la Brita Imperio, malkaŝis al mi la formulon de ŝmira ŝlimo kiu mirakle harmoniigas la haŭton, beligas la buston, tajloras la talion kaj velurigas la vizaĝon !

Provizo de tiu ŝlimo kostos al vi absolute nenion. Sendu nur dudek jam uzitajn razil-klingojn, kopion de *Kon Tiki* kaj foton de Hans Jakob, al :—

S-ro E. K. Skuzo,
211 Vicnŝpicl Strasse,
Ober-Unterdorf,
Lando de l'Fantazio.

Aldonu 50 markojn kontraŭ pak- kaj poŝt-kostoj.

En okazo de profito mi tion dediĉos al la livero de lanaj vestoj al la etaj kanibaloj en la transmaraj, tropopopolitaj, tropikaj insuloj.

W.A.G.

Tutmonda ekspozicio de infandesegnaĵoj

Nian jam anoncitan ekspozicion ni devis prokrasti pro manko de ejo, sed nun la malfermo estas difinita. La ekspozicio okazos inter la 28a de Aprilo kaj la 12a de Majo, 1954 en la ejo "De Unga" ("La Junaj") konata ekspoziciejo en la centro de la urbo.

Ĝis nun ni ricevis desegnaĵojn el 21 landoj. La moto de la desegnaĵoj estas : "Laboro kaj festo en mia hejmregiono". Sur ĉiu desegnaĵo devas esti notita en nacia kaj Esperanta lingvoj, la nomo de la lando kaj la titolo de la desegnaĵo. Krome estu notita la nomo kaj aĝo de la desegnanto. Povas partopreni infanoj en aĝo ĝis 15 jaroj. Tiuj, kiuj volas ricevi la desegnaĵojn devas noti tion. Ni denove petas kunhelpon de la Esperantistoj en la landoj kiuj ankoraŭ ne sendis materialon, precipe ni turnas nin al geinstruistoj.


Ni petegas helpon por ke la publiko en la ekspozicio estu konvinkita, ke ni Esperantistoj kapablas fari vere praktikan kaj interpopolan laboron.

La desegnaĵoj devas esti ĉe ni antaŭ la 1a de Marto, 1954.

*Sveda Laborista Esperanto-Asocio,
Barnhusgatan 8, Stockholm, Svedujo*

La sekretario kaj stabo sincere salutas la legantaron okaze de la nova jaro. La Centra Oficejo ricevis tiom multajn salutojn, ke ne estas eble respondi aparte al ĉiu, sed ni sincere reciprokas la bondezirojn. S-ro Mooy (red. de la Enigma paĝo) ankaŭ ricevis multajn bondezirojn kaj li kore dankas la sendintojn kaj salutas okaze de la festotagoj.

Enigma Konkurso N-ro 84



Solvojn oni sendu al S-ro P. H. Mooy, 28 rue Stuyvenbergh, Brussel II, Belgujo. Por ĉiu tute korekta solvo oni kutime donas 5 poentojn. Ĉiufoje la tri personoj, kiuj havas la plej altajn poentnombrojn, gajnas premion. Ĉiu MA de UEA kun la sama ŝanco povas komenci la sendon de la solvoj je kiu ajn momento. Limtempo por Eŭropo estas du monatoj.

Pliaj informoj, se dezirataj, riceveblaj de S-ro Mooy kontraŭ unu respondkupono internacia.

Solvoj :

N-ro 189 : Proverbo : Ne volas kokin' al festeno, sed oni ĝin trenas perforte. Horizontale : nevolaskokin, erinacoaroga, tariferpimol, roto-oriteorf, omarookondue, fjordoostars, rekordotomat, elitaondmane, ponardorafin, satkrokodilo, areuar-anodas, nertniĝinode.

N-ro 190 : Se edzino ordonas, domo ordon ne konas. Se la gasto estas amata, eĉ lia servanto ne restas malsata. Ne iru al fremda anaro kun via regularo. Feliĉo vezike sin levas, sed baldaŭ falas kaj krevas. Ekzistas ezoko, por ke fiŝetoj ne dormu.

Gajnis la premiojn post kontrolo de la 80-a konkurso : S-ro Ch. Brunet (Franc) 152, S-ro L. Sandberg (Norv) 147, S-ro A. Pittoors (Belg) 138.

Enigmo N-ro 193 : Krucvort-enigmo. Figuro : kvadrato el 11×11 kvadratetoj sen nigraj fakoj.

Horizontale : 1. Bazita sur faktoj kaj spertoj kaj ne sur teorio. 2. financa institucio + respektoplena al Dio + fumilo (R). 3. poseda pronomo + distingilo (R) + malŝate ridindiga. 4. danĝera besto + himno gloranta Apolonon (R) + sufikso. 5. nombro + glando + participa finaĵo. 6. eŭropano + epiteto, ĝenerale ne favora por homo. 7. maniero de moviĝo de iu loko al alia + inteligent-provo + arbo (R). 8. akompanantaro + persona pronomo + en iu loko. 9. malkonfesi + komenco de batalo + muzika sono (R). 10. trinkaĵo + malbonodora mambesteto (R) +

sovaĝa bovo (R) + participa finaĵo. 11. parto de la zoologio.

Vertikale : 1. mezgrada diplomito. 2. manĝebla krustulo sen pinĉiloj (R) + konjunkcio + sufikso. 3. persona pronomo + glua suko el iaj arboj + demanda pronomo. 4. koloro + kore ŝati iun. 5. nuanco de la voĉo + senenergia (R) + sufikso. 6. longa versa rakonto pri herooj + bestloĝejo. 7. ligileto + insekto (R). 8. estinta + antikva monereto (R) + metalo. 9. opozicio + maceri tekseblan planton en likvaĵo + parto de herbeca planto (R). 10. duonridi pro malica moko + persona pronomo + nedifinita pronomo. 11. komforta loĝejo el pluraj ĉambroj.

Enigmo N-ro 194 : La ĉi-subaj litergrupoj formas sinsekve la komencliterojn de 28 sesliteraj nederivitaj substantivoj, kies triaj literoj formas proverbon el la proverbaro de D-ro Zamenhof.

ge - br - ar - fa - st - tu - te - pu - po - mi - ak - dr - pr - ok - de - or - ro - re - pe - pi - vi - va - pl - ki - an - ap - vi - kl.

Por la frandemuloj mi ĉi tie prezentas belan problemon ekster-konkursan, kiun ensendis S-ro T. K. Slade (Anglujo), kaj kies solvo estas ebla sen uzo de matematiko.

Iu havis en sia poŝo dek du samspecajn tute novajn monerojn, inter kiuj troviĝas unu falsa. La falsa estas neniel ekstere rekonebla, oni nur scias, ke ĝi ne havas la bonan pezon. Trifoje pesinte per pesilo kun du teleroj sed sen peziloj, oni ĉiam povas decidi, kiu el la moneroj estas la falsa, kaj ankaŭ ĉu ĝi estas pli aŭ malpli peza ol bona monero. Kiel oni devas pesi por atingi tion? Oni kompreneble ekskluzivu ĉiun hazardon.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 256

2-an de Decembro 1953

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de novembro kaj ankaŭ, por komparo, je la sama dato en 1952 :

	1952	1953
Asociaj membroj	9398	9582
Individuaj membroj :		
MJ 930		916
MA 3804		3913
MS 524		610
Patronoj .. 10		6
DM 265		264
HM 58		58
	5591	5767
	14989	15349

NOVA DUMVIVAJ MEMBROJ

Lacoste, F-ino G., Savignac, Francujo
 Marthaler, S-ino L., Ascona, Svislando
 Coutinho, S-ino M. S., Belo Horizonte, Brazilo
 Jagoda, S-ro M., Brooklyn, N.Y. Usono
 Haubrich, S-ro E., Rotterdam, Nederlando
 Donalson, S-ro J. H., Tazewell, Va., Usono

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1953

609. Juruena, S-ino C. A. Z., Rio de Janeiro, Brazilo
 610. Brigido, S-ro M. R., Niteroi, Brazilo
 611. Anjér, S-ro L., Oslo, Norvegujo

PATRONOJ 1954

5. Rieckhoff, S-ro O., Lemförde, Germanujo

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1954

37. Böning, S-ro B., Bremen, Germanujo
 38. Helfers, S-ro F., Karlsruhe, Germanujo
 39. Michling, S-ro H., Hannover, Germanujo
 40. Michling, S-ino I., Hannover, Germanujo
 41. Pilhofer, S-ro O., Nürnberg, Germanujo
 42. Raab, S-ro J. M., Nürnberg, Germanujo
 43. Schönrich, S-ro K., Wiesbaden, Germanujo
 44. Simon, S-ro K., München, Germanujo
 45. Suermann, S-ro J., Bonn, Germanujo
 46. Wehrheim, D-ro H., Hildesheim, Germanujo

47. Wilke, S-ro H., Berlin, Germanujo
 48. Miede, S-ino M., København, Danlando
 49. Aardestrup, S-ro Th., København, Danlando
 50. Hansen, S-ro A. E. R., Middelfart, Danlando
 51. Baur, D-ro A., Bern, Svislando
 52. Birchmeier, S-ro K., Zürich, Svislando
 53. Bohren, Prof. A., Thun, Svislando
 54. Harry, S-ro R. L., Genève, Svislando
 55. Hohl, S-ro J., Flims, Svislando
 56. Jayet, F-ino E., Morges, Svislando
 57. Le Brun, S-ro P., Kreuzlingen, Svislando
 58. Roth, F-ino F., Solothurn, Svislando
 59. Blóndal, S-ro B. P., Hvammstanga, Islando
 60. Broise, S-ro, Longué, Francujo
 61. Lamant, S-ro L., Limoges, Francujo
 62. Maillard, D-ro G., Bourg-la-Reine, Francujo
 63. Yelland, S-ro E. E., Aspremont, Francujo
 64. Herrero, D-ro R., Valencia, Hispanujo
 65. Menéndez González, S-ro A., Gijón, Hispanujo
 66. Pastor, S-ro A., Bilbao, Hispanujo
 67. Baaten, S-ro W., Utrecht, Nederlando
 68. van Dijk, S-ro J. P., Vlissingen, Nederlando
 69. Slot, S-ro R., Zeist, Nederlando
 70. Schofield, S-ro B. S., Bury, Anglujo
 71. Fuller, S-ro S. T., Brighton, Anglujo
 72. Smith, S-ro N. R., Manchester, Anglujo
 73. La Pila, S-ro L., Milano, Italujo
 74. Eichholz, S-ro R., Toronto, Kanado
 75. Feis, S-ro G., Altenwald, Sarlando
 76. Briggs, S-ro G. A., McKeesport, Pa., Usono
 77. Vosteen, S-ro K., Wüstring, Germanujo
 78. Bettges, S-ro J., Duisburg, Germanujo
 79. Epstein, S-ro F., Hamburg, Germanujo
 80. Maywald, S-ro F., Passau, Germanujo
 81. Schuster, S-ro E. L., Wiesbaden, Germanujo
 82. Strauch, S-ro A., Bad Pyrmont, Germanujo
 83. Falch, S-ro A., Kragerø, Norvegujo
 84. Anjér, S-ro L., Oslo, Norvegujo
 85. Engen, S-ro P., Vestfossen, Norvegujo
 86. Fygle, S-ro B., Bodø, Norvegujo
 87. Maarli, S-ro E., Bodø, Norvegujo
 88. Weile, S-ro K., Vordingborg, Danlando

89. Waarst, S-ro E., Aalborg, Danlando
90. Windeballe, S-ro E., Odense, Danlando
91. Jahn, S-ro C. J., Brønshøj, Danlando
92. Petersen, F-ino A., København, Danlando
93. Vasiljef, S-ro L., København, Danlando
94. Gacond, S-ro C., Neuchâtel, Svislando
95. Kuhn, S-ro G., Zürich, Svislando
96. Pilling, F-ino F., Chesterfield, Anglujo
97. Prince, S-ro A., Letchworth, Anglujo
98. Broadway, S-ro B. J., Bournemouth, Anglujo
99. Fisher, S-ro A., Worthing, Anglujo
100. Jones, S-ro D. R. T., Lampeter, Kimrujo
101. Kennedy, S-ro D., Bishop Auckland, Anglujo
102. Kennedy, S-ino M., Bishop Auckland, Anglujo
103. Laudyn-Chrzanowski, S-ino E. A., Newquay, Anglujo
104. Leppington, S-ro J. M., Scarborough, Anglujo
105. Miller, S-ro J. R., Stone, Anglujo
106. Pearson, S-ro M., Sheffield, Anglujo
107. Perry, S-ino M. J., Herne Bay, Anglujo
108. Pilling, S-ro H., Burnley, Anglujo
109. Spence, D-ro D. B., Mersea, Anglujo
110. Spence, S-ino F., Mersea, Anglujo
111. Watson, S-ro L. G., Greenford, Anglujo
112. Sliggers, S-ro B. C., Amsterdam, Nederlando
113. Bonomi, D-ro P., Verona, Italujo
114. Jensen, F-ino G. R., Falling, Danlando
115. Larsen, S-ro L., Odense, Danlando
116. Nielsen, S-ino E., Vejle, Danlando
117. Donner, S-ro W. A., Bedford, Ohio, Usono
118. Björkstrand, S-ro E., Skelleftea, Svedujo
119. Blid, S-ro A., Nynäshamn, Svedujo
120. Cooper, S-ro B., Borås, Svedujo
121. Fingalsson, S-ro H., Gisebo, Svedujo
122. Harlin, S-ro G., Spangenäs, Svedujo
123. Lindberg, S-ro T., Prässebo, Svedujo
124. Malmkvist, S-ro A., Visby, Svedujo
125. Nolberg, S-ro E., Surte, Svedujo
126. Olsson, F-ino G., Strömsnäsbruk, Svedujo
127. Olsson, S-ro O., Lund, Svedujo
128. Olsson, S-ro S., Strömsnäsbruk, Svedujo
129. Persson, S-ro O., Trelleborg, Svedujo
130. Pettersson, S-ro T. A., Göteborg, Svedujo
131. Sjöblom, F-ino E., Åstorp, Svedujo
132. Turner, S-ro F., Linköping, Svedujo
133. Girolidi, S-ro A., Torino, Italujo

134. Gjuras, S-ro J., Varazdin, Jugoslavujo
135. Haas, S-ino P., Maribor, Jugoslavujo
136. Bluett, S-ro T. L. C., Truro, Anglujo
137. Fraser, S-ro T. C., Kirkcaldy, Skotlando
138. Goulding, S-ro E. I., Woking, Anglujo
139. Robertson, F-ino E. M., Halifax, Anglujo
140. Lamb, S-ro W. R., Sydney, Aŭstralio

DONACOJ al la Ĝenerala Kaso : F. W. Shaw 5ŝ. 6p., D-ro R. Maraury 20ŝ., B. Schofield 5ŝ., F. W. Shaw 8ŝ., R. C. Ashford 14ŝ., S-ino D. Lencer 14ŝ., W. A. Donner 5ŝ., H. Michling 5ŝ., E. H. en M. 40ŝ.

DONACOJ al Fondaĵo Montevideo : P. Le Brun 10ŝ., D-ro R. Maraury 20ŝ., H. W. Allen-Smith 20ŝ., Cejlonaj Budhanoj 20ŝ., Rochdale Esp. Grupo 42ŝ., Bournemouth Esp. Societo 63ŝ., E. G. Lane 4ŝ., E. M. Rosher 20ŝ., Manchester Esp. Societo 60ŝ., E. G. Dodge £7, F. W. Shaw £5, Birmingham Esp. Soc. 42ŝ., San Francisco Esp. Societo 35ŝ., LEEN-grupo Hilversum 46ŝ., P. Thorsen 10ŝ., Prof. H. Rissom £20, Esp. grupo "Laboro", München 17ŝ., D-ro K. Kovač. 4ŝ. 6p., J. Vilkki (kolektita en Finnlando) £10 7ŝ., F. Garcia 8ŝ. 6p., Badalona Esp. grupo 8ŝ. 6p., F-ino A. Petersen 10ŝ., K. Schönrich 16ŝ. 6p., Montpellier Esp. grupo 4ŝ., S-ino Trésorier 20ŝ., E. Gasse 20ŝ., G. Maillard 20ŝ., A. Frangeul 20ŝ., J. L. Tortel 40ŝ., Vichy Esp. grupo 40ŝ., C. Martin 2ŝ., Schunck P. 5ŝ., J. Guillaume 20ŝ., Fed. Centra Montaro, Francujo 20ŝ.

Sumo ĝis fino de novembro £180-2-4.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

C. C. GOLDSMITH, *Sekretario.*

ESPERANTO

Tole-binditaj volumoj

- 1951 Al MA de tiu jaro 5ŝ. 6p. afr. al aliaj 10ŝ. 6p.
- 1952 Al MA de tiu jaro 5ŝ. 6p. afr. al aliaj 10ŝ. 6p.
- 1953 Al MA de tiu jaro 5ŝ. 6p., afr. al aliaj 10ŝ. 6p. (Preta nur komence de februaro).

Mendu ĉe U.E.A.

Notu, ke ni sendas volumojn po 5ŝ. 6p.
NUR rekte al la koncernaj MA.

ANONCETOJ

Kosto : du pecoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Ĉiu anoncanto morale devigas sin respondi minimume unu fojon al ĉiu kiu skribas.

Anonceto por iu numero devas atingi nin antaŭ la 6-a de la antaŭa monato.

Tial mi gloras Vin, ho Eternulo, inter la popoloj, kaj pri Via nomo mi kantas.

2 Sam. 22. 50.

42-jara instruisto deziras korespondi pri diversaj temoj. Interesoj : literaturo, humanistaj aferoj, kaj la instrua profesio. Nepre respondos. Jarvis E. Bush, 3700 North 75th Street, MILWAUKEE 16, Wisconsin, Usono.

Ringwood Grammar School (fondita en 1577), West Hill Road, BOURNEMOUTH, Anglujo, bonvenigas knabojn el Britujo kaj aliaj landoj por eduko cele al Ĝenerala Eduka Atesto aŭ por libertempoj.

Letervesperon okazigas Fredericia Esperanto-Klubo en februaro 1954. Ni anticipe dankas pro ĉiuj karto kaj letero kaj garantias respondon al ĉiu. Adreso : S. K. Nielsen, Havepladsvej 136, FREDERICIA, Danlando.

Kultura Esperanto-Domo akceptos laŭeble de junio ĝis septembro ĉiulandajn Esperantistojn. Eventuale iam ajn karavanojn. Informpeto sendota kun internacia respondkupono al Kultura Esperanto-Domo, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire), Francujo. Represo petata.

Fak-specialisto prilaboras, produktas kaj riparas Bobenojn, regulatorojn de tensio por dinamo, elektro-aparatojn por aŭtomobiloj. Turnu vin al la Firmo B.E.Z., placo Insubria 22, MILANO, Italujo.

Ne-katolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika religio, povas ricevi ilin senpage pere de la Sekretario de la Internacia Katolika Informejo, Fraterhuis, LOONOPZAND, Nederlando.

Germana komercisto serĉas rilatojn kun komercistoj kaj ĵurnalistoj. Interŝanĝas nacilingvajn il. gazetojn k.t.p. E. Stolzenhain, Uerdingen am Rhein 146, Germanujo.

Ing. Jaddo Couto Maciel, Delegito de UEA en SALVADOR, Bahia, Brazilo, dezirante fari ekspozicion de vidaĵoj de urbdomoj en diversaj landoj de la mondo komence de 1954, petas helpon de samideanoj. Al ĉiuj li rekompencos per vidaĵo de urbdomo de sia urbo.

F-ino Laura Rebelo de Carvalho, Ladeira do Castro 68, Santa Teresa, RIO DE JANEIRO, Brazilo, deziras korespondi kun samideanoj en la tuta mondo.

38a Brita Kongreso de Esperanto okazos en Manchester. Pentekoston 1954. Precipe oni invitas eksterlandanojn. Bonvole sin turnu al S-ro Norman Smith, 10 Broomville Avenue, Sale, MANCHESTER, Anglujo por plua informo.

Korespondantojn mi serĉas por 20 gestudentoj kaj 10 plenaĝuloj. Respondo garantiata. S-ro Rétault, 3 rue de la Halle au Blé, DIEPPE (S.I.), Francujo.

Th. Dolĉinkov, TIRNOVO, Bulgarujo, deziras interŝanĝi pm. en serioj.

La sekcio F.L.E. Westzaan, Zamenhof, Nederlando, organizas letervesperon en Marto, 1954. Ni petas multajn kartojn, leterojn aŭ presaĵojn. Ni certe garantias respondon. Adreso : T. Brink-Blomberg, Sekretariino, Weiver 47, WESTZAAN, Nederlando.

33-jara S-ino Martta Mäkelä, HEINOLA 2, Finnlando, deziras korespondi per pk. il. kaj leteroj kun ĉiuj landoj.

Neuzitajn poŝtmarkojn kiuj rememoras unu jarcenton pri iu aŭ io kolektas el ĉiuj landoj S-ro Walter A. Donner, 17308 Mapleboro Road, MAPLE HEIGHTS, Ohio, Usono. Rekompencos per usonaj poŝtmarkoj.

Miaj gekursanoj (16-26-jaraj) aranĝos leter- kaj korespond-vesperon. Skribu multnombroporinteresiĝilin. Stockhausen, Weisenau 13, LOHR/M., Germanujo.

Poŝtkartvespero aranĝiĝos por la gelernantoj (infanoj, junuloj kaj plenaĝuloj) de oficiala vesperklaso, la 6-an de aprilo 1954. Sendu poŝtkarton, indikante preferon rilate respondon, al La Esperanta Kurso, Bush Elms Evening Institute, Hyland Way, HORNCHURCH, Essex, Anglujo.

12 gekursanoj, 30-50 jaraj, deziras korespondi kun samideanoj el ĉiuj landoj. S-ro Bernh. Jensen, Ewaldsvej 38, AABYHØJ, Danlando.

Jugoslava Esp.-poŝtmarko 300 dinara serĉata. Proponu al Pressburger, Amidar 177/5, Gav Jam G., HAIFA, Izraelo.

Juna ĉeĥoslovaka samideano volas korespondi kun eksterlanda samidean(in)o pri ĉiuj temoj. Josef Dostál, ĈELECHOVICE na Hané, Zahradni 158, Morava, Ĉeĥoslovakujo.

TUTMONDA INFANKONKURSO

Modele de la aranĝo Gvatemala ni organizos komence de septembro 1954 tutmondan ekspozicion de kolorigitaj infandeseĝoj sub titolo

Nia lando kaj popolo

Ni petas ĉiujn geinstruistojn, ke ili kunhelpu instigante la infanojn fari sian plej bonan kaj al ni sendi la deseĝojn. Ni ankaŭ petas la tutmondan esp. gazetaron represi la jenan. Tiel ĝi aperos en ĉiu nacia gazeto esperanta kaj ni havos sukceson.

En la premia komitato sidas : 2 artpentristoj, 2 instruistoj, 2 esperantistoj. La ekspozicio okazos en la "Arta Halo de Karlskoga", kaj la plej bona de ĉiu jarklaso ricevos valoran premion. Krome la kvar sekvantaj ricevos specialan premion. Entute 40 valoraj premioj.

KONDIĈOJ

Aĝo de 7 ĝis 14 jaroj.

Ĉiuj deseĝoj sub temo "Nia lando kaj popolo".

La instruistojn ni petas elekti la plej bonajn deseĝojn el sia klaso kaj sendi ilin.

Sur la antaŭa flanko skribu la nomon, aĝon, titolon de la deseĝo kaj landon, sur la posta flanko **preslitere la nomon, adreson, landon**. Tio estas tre grava.

Antaŭ la fino de junio 1954 la deseĝoj devas esti en Karlskoga. La adreso por la sendaĵoj : Karlskoga Esperanto-Societo, "La Aglo", c/o Tistad, Hotellgatan 5, KARLSKOGA, Svedlando.

Tri monumentoj de la mondliteraturo

varme rekomendataj de la tuta Esperanta gazetaro pro la lingva perfekteco :

La Libro de la Spiritoj, de Allan Kardec, trad. de Porto Carreiro Neto.

Enhavanta 1018 demandojn kun detalaj respondoj pri ĉiuj problemoj de la homa vivo antaŭ kaj post la morto.

1 vol. 532-paĝa, bonega papero, broŝ. 10ŝ. 6p., afranko 9p.

La Evangelio laŭ Spiritismo, de Allan Kardec, trad. de I. G. Braga.

Ĝi estas la plej klara eksplikado de la kristana religio el vidpunkto spiritisma.

1 vol. 432-paĝa, broŝ. 8ŝ. 6p., afranko 8p.

Antaŭ du mil jaroj . . . de F. C. Xavier, trad. de Porto Carreiro Neto.

Historia romano pri la naskiĝo de Kristanismo kaj la Roma politiko de la 1-a jarcento de nia epoko.

1 vol. 400-paĝa, broŝ. 15ŝ., afranko 6p.

Mendu ĉe

**Universala Esperanto-Asocio, Heronsgate, Rickmansworth,
Herts., Anglujo**